Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 20 — Trimonata

1/90

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktisto: István Ertl

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Esperanto-fako, Universitato ELTE/BTK
H-1364 Budapest, Pf. 107
☎ + 36-1-1180-966/185

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

Enhavo

Formaggio, E. – *Lerneja eksperimento pri lernfacileco kaj transfero en fremdlingvoinstruado* 1
Ludwig, E. – *Instruistoj pri lingvoj kaj Esperanto* 10
Li Weilun – *Kion fari antaŭ diversnivelaj lernantoj?* 11
Barcsay, Zs. – *Recenzo: "La knabino kiu ne volis iri al la infanejo"* . . 13
8a Internacia Metodika Seminario 14
Raporto pri la februara estrar-kunsido de ILEI 17
Diversaj edukaj aranĝoj (Svedio, Francio, Hungario, Slovakio, Finnlando, Germana DR) 22
Internaciaj ekzamenoj UEA/ILEI – Raporto, protokolo, difina teksto . 27
Leterkesto (Declerck, Vincent) 33
Fondaĵo Szerdahelyi: unuaj donacoj ricevitaj 34
Sirkó, I. – *Recenzo: "Kreito, lernu kreive"* 35

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto : Edward Symoens, Putsesteenweg 131/A, B-2180 Heide (Kalmthout); tel. (03)666.62.66 — Kunordigado, informado en pedagogiaj medioj, rilatoj kun Unesko kaj UEA.

Vicprezidanto : Stefan MacGill, Zsókavár ut. 46 IX 36, H-1157 Budapest; tel. (1) 1832-207 (forrestas de majo ĝis aŭgusto) — Internaciaj ekzamenoj kaj iliaj kursoj, statistikado de instruado, internaciaj lerniloj, lerneja projekto, IPR.

Ĝen. Sekretario : Audrey Childs-Mee, p/a Cornercroft, 21 Hall Close, Kibworth Harcourt, Leics. LE8 0ND, Britio. — Rilatoj kun sekcioj, membroj kaj kun UEA. Internaciaj korespondaj kursoj. Pedagogia prizorgo de infanaj kongresetoj de UEA (Provizore la vicsekretario traktas la laboron).

Kasisto : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby; tel. (0415)-501 52 — Financaj rilatoj kun sekcioj, konferenco, k.a.

Vicsekretario : Malcolm Jones, 41 Causeway, GB-SN 15 3DD Chippenham; tel. (0249) 656041 — Venonta konferenco, lernejana korespondado, unuecigo de naciaj ekzamen-sistemoj.

Membroj : Till Dahlenburg, Str. der DSF 13, DDR-2722 Brüel; tel. (09-8576)-528 — Gvido de pedagogia komisiono, internaciaj ekzamenoj, metodikaj kursoj.

Zang Danchen, Gong Wai Xi, Shifan Daxue, Wuhan, Huazhong, Ĉinio — Evoluo kaj fondo de sekcioj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko.

Elisabetta FORMAGGIO:

Lerneja eksperimento pri lernfacileco kaj transfero en la fremdlingvoinstruado

La lernfacileco de la Internacia Lingvo de D-ro Esperanto kompare al etnaj lingvoj kaj plifaciligo de la lernado de ĉi tiuj pro antaŭa ILo-lernado (t.n. transfero) estis jam temo de pluraj eksperimentoj ofte malbone dokumentitaj. Plej konata estas la koncerna publikaĵo de I. Szerdahelyi (1970) pri malgranda eksperimenta projekto, kiu fariĝis la instigo kaj por la, de li science kontrolita, t.n. *kvinlanda eksperimento* de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) 1971–1974, kaj de dua ILEI-eksperimento realigita 1975–1977 kunlabore kun la siatempa FEOLL-Institut für Kybernetische Pädagogik Paderborn. Tiu instituto ebligis siatempe la presigon de la aktoj de la unua ILEI-eksperimento almenaŭ en malgranda eldonkvanto (Behrmann, H. *Lehrplanische Rationalisierung...* 1975). Germanlingva resuma pritrakto de ĉi tiu esploro troviĝas en Szerdahelyi/Frank, 1976). La rezultojn de la dua ILEI-eksperimento publikigis Sonnabend (1979) surbaze de pluraj antaŭaj provizoraj sciigoj, precipe de B. S. Meder (1978). La dua ILEI-eksperimento fariĝis instigo kaj unua empiria aplikado por la klerigkibernetika transferteorio; kune kun ĉi tiu ĝi estis (en ILo) detale prezentata kaj diskutata 1980 kadre de la IX-a Internacia Kongreso pri Kibernetiko en Namur (B), (vd. Nolte 82, Frank 82). Malpli detalan kaj pli popularan vortigon (Frank, 1984) de la teorio kaj la empiriaj rezultoj aŭdis dulingve (ILe kaj japane) la partoprenantoj de speciala konferenco okazigita de la Japana Esperanto-Instituto okaze de la 13-a Internacia Lingvistika Konferenco en Tokio 1982. Tiu publikaĵo intertempe ekzistas ankaŭ kun aŭ en aliaj naciligvaj tradukoj – ĝis nun – en la lingvoj franca, nederlanda, hispana, itala, korea, germana kaj ĉina, tiel ke la dua ILEI-eksperimento estas vaste konata de pedagogoj kaj lingvistoj ankaŭ ekster la ILo-parolantaro. Ankaŭ sendepende de ILEI – kaj pli frue – okazis similaj eksperimentoj, G. Lobin en disertaĵo el 1984 klopodis ilin sintezi.

La du ĝeneralaj rezultoj, kiujn oni trovas en ĉiuj koncernaj publikaĵoj estas:

1. ILo estas pli facile lernebla ol etnaj lingvoj;
2. ILo havas *propedeŭtikan valoron* tiusence, ke ĝia lernado kiel unua fremda lingvo plifaciligas la postan lernadon de etnaj fremdlingvoj tiom kaj tiel, ke rekomendindas komenci la lernejan fremdlingvan instruadon per almenaŭ elementa ILo-kurso.

Tamen ankoraŭ indas daŭrigi la empirian esploradon en ĉi tiu kampo, ĉar:

1. dubemuloj ankoraŭ postulas pli fidindan statistikan bazon;
2. la rezultoj ja koincidas laŭkvalite, sed laŭkvante dependas de pluraj variabloj, precipe de la gepatra lingvo de la lernantoj, de ilia aĝo, de la maniero kaj daŭro de la instruado, de la instrucelo kaj la mezurmetodo de la fakte atingita ILo-kompetenteco kaj (kaze de transfereksperimentoj) de la cellingvo poste lernenda.

La esploro ĉi tie prezentota (kaj komplete dokumentita ĉe la Cattedra di Chiavari dell'Istituto Italiano di Esperanto) baziĝas sur lingvoinstrua eksperimento, disvolvita en itala elementa lernejo (Scuola Elementare *Rocca*, San Salvatore di Cogorno) dum la lernojaroj 1983–84/1984–85. Kadre de tiu eksperimento oni enprogramis dujaran instruadon de la Internacia Lingvo Esperanto dum la kvara kaj kvina instrujaroj. La projekto koncernis du paralelajn klasojn.

La ĉefaj celoj de tiu ĉi elekto estis:
– rapide ekhavigi utilan lingvan komunikilon por tuja uzo en transnaciaj interrilatoj (korespondado, eventualaj renkontoj);
– disponi pri simpla kaj regula komparmodelo por pli efika instruado de la gepatra lingvo;
– pretigi praktikan bazon por la estonta lernado de fremdaj lingvoj.
La enkonduko de ILo celis plie la ĝeneralan pliriĉigon de la kleriga kaj eduka programo pere de ĝia vasta utiligo por la ceteraj lernobjektoj.

La planoj realiĝis kun kontentigaj rezultoj. El ili estos citataj en la jena raporto nur tiuj, kiuj donis la bazon por la postaj lingvodidaktikaj esploroj.
Laŭ la finaj kontroloj, la atingita parolkapablo de la infanoj estis notinde bona: ili dialogis spontane pri variaj temoj (ĉiutaga vivo en la hejmo, en le lernejo, kun la geamikoj; lernado, libertempo, korespondaj rilatoj, ktp.) ilia elparolo estis korekta; gramatikaj aŭ leksikaj malkorektaĵoj kelkfoje ĝenis, sed neniam malebligis la interkompreniĝon.

En skriba formo la gelernantoj ricevis la sekvajn taskojn:

1. Skribi laŭ diktado	**Meznombro de eraroj**
10 konatajn vortojn sen ortografiaj malfacilaĵoj	0.5
10 konatajn vortojn kun unu malfacilaĵo	3.2
10 konatajn vortojn kun pluraj malfacilaĵoj	5.8
10 nekonatajn vortojn sen malfacilaĵoj	1
10 nekonatajn vortojn kun malfacilaĵoj	5.7
Tekston el 35 konataj vortoj	5.9
En tiuj 85 vortoj sume	22.1

2. Uzi ĝustajn verboformojn en serio de frazoj (indikativo: tempoj estanta, estinta, estonta, volitivo, kondicionalo, infinitivo)	**Meznombro de ĝustaj solvoj:** 72%
3. Kompletigi serion da demandaj frazoj per taŭgaj demandovortoj (pri subjekto kaj objekto, pri ilia kvanto kaj kvalito, pri la loko, tempo, modo, kaŭzo de agoj)	84%
4. Respondi al serio de demandoj laŭ bildo	**Atingitaj punktoj meze:** 8.5/10

Aŭtune de 1985 la infanoj eniris la postelementan lernejon (Scuola Media Statale, San Salvatore di Cogorno), kie ili eklernis la francan lingvon. Je la fino de la trijara lernperiodo (1985–88) ili ricevis analogajn skribajn kontroltaskojn – en la franca. Al la ĵus listigitaj kvar provoj estis aldonitaj pliaj tri:
5. Rekoni 60 francajn vortojn, unuope prezentitajn en aŭda kaj vida formo, kiuj ne similas al la samsignifaj italaj vortoj, sed – skribe aŭ parole – montras evidentan parencecon kun la Esperantaj ĝemelvortoj. (Ekz. papillon – farfalla – papilio).
6. Grupigi vortojn laŭ gramatikaj kategorioj.
7. Kontrolo pri sintaksaj konoj.

La sep taskojn alfrontis samtempe ankaŭ la mezlernejaj samklasanoj, kiuj en la elementa lernejo ne lernis la Internacian Lingvon.

La nova testado ebligis la efektivigon de du esploroj:

a. Komparinte la rezultojn de la samaj gelernantoj en Eo kaj en la franca, oni eltiris indikojn pri la lernorapideco de la du lingvoj;

b. komparinte la franclingvajn kompilaĵojn de la geknaboj, kiuj antaŭe lernis ILon, kun tiuj, kies kompilintoj ne ricevis la saman antaŭpreparon, oni akiris indikojn pri la propedeŭtika valoro de la Internacia Lingvo.

En la sekva priskribo de la esplorado estos uzataj la jenaj mallongigoj:
G+ – grupo kun lingvoorientiga antaŭpreparo
G– – grupo sen lingvoorientiga antaŭpreparo
E – Esperanto
F – franca lingvo

ESPLORO 1 $= \frac{E \leftrightarrow F}{G+}$ **ESPLORO 2** $= \frac{F}{G+} \leftrightarrow \frac{F}{G-}$

Bazaj indikoj pri la ekzamenitaj grupoj

G+		
Lernitaj lingvoj	ESPERANTO	FRANCA
Anoj	25	24
Aĝo de la grupanoj	Komence: 9 jaroj Fine: 11jaroj	Komence: 11 jaroj Fine 14 jaroj
Daŭro de la instruado	2 lernojaroj	3 lernojaroj
Horoj entute	160	280
Instruformo	Unu 90 minuta leciono semajne ekster la normala horaro, gvidata de lingvoinstruisto kun la ĉeesto de la klasinstruistoj, plus proksimume 90 minuta praktika aplikado semajne, lige al aliaj lernobjektoj, dum la normala programo, fare de la klasinstruistoj	Tri unuhoraj lecionoj semajne, gvidataj de lingvoinstruisto, laŭ la programo fiksita de la klerigministerio
Dato kaj loko de la finaj provoj	31.05.1985 Scuola Elementa "Rocca", S.Salvatore di Cogorno, Italio	28.03.1988 Scuola Media Statale, S.Salvatore di Cogorno, Italio
Daŭro	2 horoj	2 horoj
Nombro de la taskoj	4	7


ESPLORO 1: Komparo de sumigitaj rezultoj, atingitaj de la samaj gelernantoj en Esperanto kaj en la franca lingvo:

PROVOJ	REZULTOJ	E	F	Dif.
1.Ortografio	Meza nombro de eraroj en 85 vorto diktitaj	22	46	– 24
2.Uzo de verboj	Ĝustaj solvoj	72%	28%	+44%
3.Uzo de demandvortoj	Ĝustaj solvoj	84%	58%	+26%
4.Respondoj al demandoj	Punktoj atingitaj meze	85%	74%	+11%
		80%	53%	+27%

La rezultoj atingitaj en la Internacia Lingvo estas pli bonaj en ĉiuj provoj: la ortografiaj eraroj sumas apenaŭ la duonon de la franclingvaj malkorektaĵoj, kaj en la aliaj provoj la tabelo montras 27-procentan diferencon favore al Eo. Surbaze de tiu ĉi simpla komparado oni povas konkludi ke ILo estas pli rapide alproprigebla ol la franca lingvo, sed la kvantaj indikoj certe ne estas ĝeneraligeblaj, la lernado de la du lingvoj okazis ja en tre malsamaj cirkonstancoj. Diferencis

– la daŭro de la instruado (E: 160 horoj, F:280 horoj)
– la aĝo de la infanoj (E: 9–11 jaroj, F: 11–14 jaroj)
– la lingva sperteco de la gelernantoj (E = unua fremda lingvo, F = dua fremda lingvo)

La suba grafikaĵo ebligas pli profundan esploradon.



E = pruvitaj konoj pri Eo je la aĝo de 11 jaroj

F = pruvitaj konoj pri la franca lingvo je la aĝo de 14 jaroj

X = supozebla nivelo atingita en la franca en tiom da tempo, kiom estis dediĉita al la instruo de Eo

Y = supozeble necesa tempo por akiri tiom da konoj pri Eo, kiom la gelernantoj alproprigis pri la franca

Ignorante por momento la fakton, ke la kompetenteco ne kreskas proporcie al la lernotempo sed sekvas lernokurbon (strekumitaj linioj), ni elkalkulas la jenajn hipotezajn konkludojn:

1. Se la instruado de la franca lingvo daŭrintus nur la 160 instruhorojn uzitajn por ILo, la kompetenteco estintus nur 30% – anstataŭ la 80% reale atingitaj de ILo,

2. por atingi en la franca lingvo la nivelon reale atingitan en ILo post 160 instruhoroj, estintus necesaj 423 instruhoroj anstataŭ la 280 disponeblaj,

3. la kompetentecon reale atingitan en la franca lingvo post 280 instruhoroj oni povintus atingi en ILo jam post 106 instruhoroj,

4. se la instruado de ILo daŭrintus la 280 instruhorojn uzitajn por la franca, la atingita kompetenteco en ILo estintus laŭ la sama kalkulado – 140%!

La lasta rezulto evidentigas la neceson konkludi surbaze de la lernokurbo, kiun la klerigkibernetiko (vd. ekzemple pliajn prikalkulojn de Prof. Frank) priskribas per formulo:

$$p_t = 1 - e^{*t}$$

kie p_t estas la kompetenteco akirita post la tempo t kaj * la lernfacileco. Ĉi tiu kalkuliĝas el niaj empiriaj rezultoj $(p_t,t) = (80\%, 160$ instruhoroj) aŭ $(p_t,t) = (53\%, 280$ instruhoroj):

$* = 10.06 \times 10^{-3}$ 1/instruhoroj por ILo

$* = 2.70 \times 10^{-3}$ 1/instruhoroj por la franca

ambaŭkaze por niaj itallingvaj lernantoj diversaĝaj: evidente la franca lingvo estas eĉ malpli facile lernebla por elementlernejanoj!

Laŭ tiu teorio pli konforma al la realo la modifitaj hipotezaj konkludoj estas

1. Dum 160 instruhoroj la kompetenteco en la franca lingvo estintus 35% anstataŭ en ILo reale 80%

2. La 80%-a kompetenteco en ILo reale atingita post 160 instruhoroj estus atingebla en la franca post 596 instruhoroj anstataŭ la 280 disponeblaj.

3. La kompetentecon reale atingitan en la franca lingvo post 280 instruhoroj oni povintus atingi en ILo jam post 75 instruhoroj.

4. Se la instruado de ILo daŭrintus la 280 instruhorojn uzitajn por la franca, la atingita kompetenteco en ILo estintus 94% (ĝi ja nur asimptote alproksimiĝas al 100%).

La rilato inter la du lernfacilecoj estas $10.06 : 2.70 = 3.73$ Tio signifas, por atingi en la franca lingvo ajnan kompetentecon p, kiun en ILo atingas 10–11jaraj italaj infanoj en certa tempo kalkulebla laŭ

$$t = \frac{-\ln(1-p)}{10.06} 10^3 \text{ instruhoroj}$$

bezonus 13–14jaraj infanoj kun la sama gepatra lingvo la 3.73-oblan tempon, 10–11jaraj infanoj eĉ pli!

Laŭ la klerigkibernetika teorio oni devus elimini la aĝdependecon konsiderante ke la lernorapideco kreskas ĝis proksimume la 14–a vivjaro proksimume proporcie al la aĝo. La akiro de certa kompetenteco en la franca lingvo tial bezonas por italaj infanoj sendepende de la aĝo 4.79-foje pli da tempo ol en ILo.

Sed eĉ tiu rezulto estas ankoraŭ tro modesta, ĉar ĝi ne konsideras, ke la komparo estas farita por la samaj lernantoj (G^+), kiuj do antaŭ la franca lingvo estis lernintaj ILon, do ĝuis la transferon! Ties ekzisto evidentiĝas el la komparo kun samaĝaj lernantoj (G^-) sen antaŭa ILo-lernado.

ESPLORO 2

Komparo de sumigitaj rezultoj, atingitaj en la franca lingvo de la gelernantoj kiuj antaŭe lernis la Internacian Lingvon (G+) kaj de tiuj, kiuj ne ricevis tian antaŭpreparon (G–):

PROVOJ	REZULTOJ	G+	G–	Dif.
1. Ortografio	Meza nombro de eraroj			
	en 85 vortoj diktitaj	46	45	-1
2. Uzo de verboj	Ĝustaj solvoj	28%	28%	–
3. Demandoj	Ĝustaj solvoj	58%	41%	17%
4. Respondoj	Ĝustaj solvoj	74%	64%	10%
5. Leksika provo	Ĝustaj solvoj	67%	59%	8%
6. Gramatika provo	Ĝustaj solvoj	64%	57%	7%
7. Sintaksa provo	Ĝustaj solvoj	69%	47%	22%
		60%	49%	11%

La tabelo ne montras diferencon en la ortografia preteco de la du grupoj: la nombro de la eraroj estas egale alta, 46–45 en 85 vortoj. La kono de la Ea alfabeta sistemo ne helpis la alproprigon de la malsimpla franca skribmaniero. Same la tre simpla kaj tute regula verbsistemo de ILo, kiun la infanoj en la elementa lernejo tiom rapide alproprigis, ne portis avantaĝojn en la ĝangalo de la francaj verboj. En la ceteraj provoj G+ tamen superis la alian grupon (G-). La eksgelernantoj de la eksperimentaj klasoj de Elementa Lernejo *Rocca* produktis sume 60 ĝustajn solvojn el cento, dum iliaj mezlernejaj samklasanoj, kiuj ne havis analogan lingvan preparon, atingis nur 49%-n. Ĉar ili ĉiuj lernis la

francan dum la sama tempodaŭro, je la sama aĝo, gvidate de la samaj instruistoj laŭ samaj programo kaj metodo, kaj ĉar la meza inteligenteca nivelo de la du grupoj montriĝis ĝenerale tute simila, estas supozeble, ke la pluso rezultiĝis el la antaŭe alprenitaj gramatikaj kaj leksikaj konoj kaj lingvaj spertoj.

Oni povas konkludi, ke la lingvorientiga preparo altigis la profiton en franclingvaj studoj almenaŭ 11 procente.

Baze de la fina konkludo de ESPLORO 2, la rezultoj de ESPLORO 1 povas esti kompletigataj per la jena noto:

Frank: Se oni kalkulas la atingitan kompetentecon nur mezume por la tri testoj uzitaj analoge ankaŭ por la ILo-eksperimentoj, la grupo G nur atingis la kompetentecon 44%. Tio signifas, ke por ili la lernfacileco de la franca estis nur

$$* = 2.07 \times 10^{-3}\ 1/\text{instruhoroj}$$

do la *transfero* de ILo estis

$$k = 2.70 : 2.07 = 1.3$$

kio tre bone konformas al la rezultoj de Frank (1981[2]). Sen tiu ĉi transfero la rilato inter la lernofacilecoj de ILo kaj la franca lingvo estas anstataŭ 4.79 eĉ 6.23!

La prezentitaj esploroj estas la unuaj en la itala lerneja medio. Iliaj rezultoj konfirmas la jam registritajn spertojn kaj prikalkulaĵojn de alinaciaj pedagogoj kaj lingvistoj rilate la eksterordinaran lernofacilecon de Eo kompare al la aliaj lingvoj, kaj rilate al ĝia propedeŭtika valoro.

La eksperimenta instruado kaj la posta esplorlaboro, en kies sinsekvaj fazoj partoprenis entute sep instruistinoj, estis disvolvataj kun seriozeco kaj sincera scivolo pri la finaj rezultoj. La manko de sufiĉa sperto kaj de preta instru- kaj ĉefe testmaterialo notinde malfaciligis kaj plimultigis la laboron. La iom post iome improvizitaj solvoj certe ne ĉiukaze estis la plej bonaj. Por igi nediskuteble konvinkaj kaj vaste konataj la atingitajn kaj plie atingeblajn rezultojn, estas nepre necese kvante kaj enhave pliriĉigi la publikindan dokumentaron, baze de internaciskala, science planita kaj kontrolita, bone kunordigita daŭrigo de la esplorado.

Literaturo:

Frank, H.: Kibernetike-pedagogia teorio de la lingvo-orientiga instruado, en Frank, Yashovardhan, Frank-Böhringer (Hsg.): Lingvokibernetiko, Sprachkybernetik, aldono al vol. 23/1982 de grkg/ Humankybernetik, G.Narr, Tübingen, 1982, p.123–144

Frank, H.: Propedeŭtika valoro de la Internacia Lingvo, en Lingvo internacia en perspektivo; 1984,5,p.4–22 (ILo kun japana traduko)

Nolte, A.: La lernplifaciligo de la Angla lingvo surbaze de la lingvo-orientiga instruado, en Frank, Yashovardhan, Frank-Böhringer (Hsg.): LIngvokibernetiko/Sprachkybernetik, p. 35–38

Meder, B.S.: Efikoj de la lingvo-orientiga instruado al la lernsukceso en la mezgrada lernejo, Eŭropa Dokumentaro 20, 1978, p. 15–18

Sonnabend, H.: Esperanto: lerneja eksperimento, Raporto, Analizo, Konkludo, Edistudio Pisa, 1979

Szerdahelyi, I.: La didaktika loko de la Internacia Lingvo en la sistemo de lernejaj studobjektoj, En: Internacia Pedagogia Revuo, kajero O, 1970

Frank/Szerdahelyi: Zur pädagogischen Bestimmung relativer Schwierigkeiten verschiedener Sprachen in GrKG 17, 1976, H. 2, p.39–44

Behrmann, H.(Red.) Arbeitsbericht IfKyP Nr.17, Lehrplanerische Rationalisierung des Sprachunterrichts, Instruplaniga raciigo de la lingvo-instruado, FEOLL, Paderborn, 1975

24a Internacia Konferenco de ILEI

Vizitu nian plej gravan pedagogian renkontiĝon, okazonta tuj post la Universala Kongreso, de la 21a ĝis la 28a de julio en nove konstruita Esperanto-centro. Vidu la informilon kaj aliĝilon en la antaŭa IPR kaj realdonita al la nuna numero. Pliajn informilojn oni mendu de Malcolm Jones, 41 Causeway, Chippenham, Wiltshire, SN15 3DD, Britio, Tel. 0249/656041. Tien direktu petojn pri pliaj informoj.

Ĝis revido en Hanabanilla!

Edmond LUDWIG (F):

Instruistoj pri lingvoj kaj esperanto

La sekvaj linioj neniel volas esti scienca analizo, sed simple surpaperigo de propraj spertoj post 14 jaroj da e-isteco. Tuj mi elbuŝigu la plej malfacile direblan konfeson: Eo sukcesis centjariĝi kaj prosperi malgraŭ la malesto de armeo da instruistoj pri lingvoj kaj de – laŭ didaktika vidpunkto – plej ofta manko de efikaj lernolibroj!

Ĉu konkludi el tio, ke tute ne necesas la helpo de instruistoj pri lingvoj? Certe ne, sed tio helpas por kompreni, ke lingvoinstruisto – kaj instruistoj ĝenerale – ne povas garantii sukceson de la lernanto. La faktoj eĉ montras, ke la lernemo kaj kapablo de la lernanto estas la decida kaj nepra kondiĉo de sukceso. Pro tio gravas la motivado kaj la talento de instruisto, profesia aŭ ne, por motivigi.

En la lastaj jaroj ŝajnas al mi, ke pli multas la instruistoj pri lingvoj en la movado, kaj didaktiko de lingvoj iĝas parto de la ekzamenoj postulataj de E-o-instruistoj. Gravaj staĝoj tiacelaj nun regule okazas en *La Chaux-de-Fonds* kaj dum seminarioj de ILEI. Ankaŭ ekzistas verko menciinda kaj ege taŭga por ĉiuj instruontoj de E-o:

Glotodidaktikaj kaj specifaj aspektoj de Esperanto-instruado de Irena Szanser.

Kiel instruisto pri la germana kaj abonanto de pluraj revuoj pri lingvoinstruado mi speciale ĝojas pro la fakto, ke tiu verko prezentas plej diversajn metodojn por instrui esperanton, kio ebligas al instruemuloj eskapi la laste furorantan modon en lingvo-instruado, kiu post iom da tempo sin montras esti nek pli, nek malpli efika ol iu ajn alia. Resume: eĉ se ĉiu novaĵo riĉigas nin je plia sperto, ni ne kredu je panaceoj!

Tio montras, ke instruistoj pri lingvoj, eĉ se ne kapablaj je mirakloj – kion ofte atendas de ili la gepatroj de la lernantoj – tamen povas helpi al Eo, *kiel Eo ankaŭ helpas al ili por ilia laboro*! Dank' al Eo, lingvo-instruistoj povas profiti ioman superrigardon pri metodoj, pro observado en plej diversaj landoj, kaj ne nur en la lando(j), kies lingvo(j)n ili instruas profesie.

Sed observado ne sufiĉas, necesas ankaŭ praktikado en instruado *kaj en lernado*. E-on mi unuacele lernis por min observi kiel lernanton de nova lingvo, kaj plian lingvon mi lernas nun por resti *instruanta lernanto* (aŭ lernanta instruisto, laŭplaĉe).

Tiuj konsideroj kondukas min al tri proponoj:

1. Ĉu diverslandanoj akceptus raporti en IPR pri instruado de didaktiko de lingvoj al studentoj en sia lando?

2. Ĉu eblus scii, en kiu lando studento, studanta lingvon por poste ĝin instrui, *ankaŭ eklernas plian*, de li ne konatan lingvon, komplemente al kursoj pri didaktiko?

3. Ĉu ILEI ne povus proponi vastskale al universitatoj kaj institutoj *elekton de Eo* por praktika spertado en studado de didaktiko? Kompreneble fakuloj pri didaktiko devus unue ellabori programon pri tiu propedeŭtika lernado, ne nur de lingvo, sed de didaktiko de lingvo. Jen elprovo sur si mem de teoriaj lernitaĵoj kaj observo de siaj propraj reagoj antaŭ ol postuli ion eble nefareblan de la estontaj gelernantoj

Laŭ kolegoj plurlandaj ŝajnas al mi ke didaktiko de lingvoj en multaj landoj ankoraŭ sufiĉe primitivas. Ĉu Eo ne povus alporti tuj duoblan solvon? Por la movado la gajno certe estus duobla: konigo de Eo en universitatoj kaj havigo de spertaj Eo-instruistoj al nia movado.

Li Weilun (Pekina Lingva Instituto):

KION FARI ANTAŬ DIVERSNIVELAJ LERNANTOJ?

Inter homoj ekzistas diferenco. Estas universala fenomeno, ke en la sama grupo la niveloj de la lernantoj estas malsamaj. Precipe en Eo-kurso la malsameco estas tre granda, ĉar la kursanoj venas de diversaj anguloj de la socio kaj diferencas iliaj aĝoj, profesioj, kulturaj niveloj ktp. Tio kaŭzas grandan malfacilon en instruado. Se ne ekzistas ebleco dividi la lernantojn en diversajn grupojn laŭnivele, oni devas alpreni aliajn rimedojn, por ke ĉiu lernanto progresu laŭ sia kondiĉo. La ĝenerala principo estas: Preni la meznivelajn lernantojn kiel ĉefajn flankojn kaj samtempe zorgi pri la altnivelaj kaj la malaltnivelaj, tio estas, la instruisto devas aranĝi instruajn aktivadojn ĉefe laŭ la kondiĉo de la meznivelaj lernantoj kaj samtempe konsideri la kondiĉon de la altnivelaj kaj la malaltnivelaj. Jen konkretaj metodoj:

1. En sia parolado en Eo dum leciono, la instruisto devas uzi frazojn, kiujn komprenas la meznivelulo. Se aperas malfacilaj frazoj, li povas peti altnivelulojn ĉinigi, por ke la malaltniveluloj komprenu.

2. La instruisto devas fari demandojn konsidere de diversnivelaj lernantoj. Malfacilaj demandoj devas esti faritaj al la altniveluloj, facilaj demandoj al la malaltniveluloj kaj ĝeneralaj demandoj al la meznivelulo.

3. Dum laŭtlegado de teksto la instruisto povas peti altnivelulon antaŭlegi. La altnivelulo devas havi bonan elparolon.

4. La instruisto povas postuli, ke la lernantoj plenumu hejmtaskojn laŭ sia kapablo. Ekzemple, post lernado de nova teksto la malaltniveluloj povas nur legi ĝin kaj respondi demandojn, la meznivelulo ankoraŭ devas fari demandojn laŭ la teksto kaj la altniveluloj devas rerakonti la tekston.

5, La instruisto devas prepari diversajn ekzercojn por diversnivelaj lernantoj. Ekzemple, tradukaj ekzercoj povas esti facilaj, meznivelaj kaj malfacilaj.

6. Dum aŭdiga ekzercado, unuafoje la instruisto devas legi la tekston per normala rapideco, por ke la altniveluloj kaj meznivelulo havu ŝancon sin ekzerci, kaj poste redukti la rapidecon, por ke la malaltniveluloj komprenu.

7. La instruisto devas korekti erarojn laŭ la kondiĉo de la lernantoj. La eraroj, faritaj de la altniveluloj, devas esti korektitaj severe, dum tiuj de la malaltniveluloj povas esti traktitaj malpli severe. La instruisto povas peti mez- kaj malalt-nivelulojn korekti ĝeneralajn erarojn, kaj peti altnivelulojn korekti la erarojn, kiuj estas malfacile korekteblaj.

8. En lingva aktivado, ekzemple en duopa konversacio aŭ en grupeta diskutado, la instruisto devas miksi lernantojn de tri niveloj, por ke la altniveluloj ludu ĉefan rolon kaj helpu aliajn.

9. La ekzamenaj demandoj devas esti diversnivelaj, por ke la malaltniveluloj povu trapasi la ekzamenon post sia penado kaj la altniveluloj ricevu bonajn poentojn.

10. La instruisto devas doni konsilojn al la lernantoj laŭkondiĉe. Ekzemple, instruisto devas senĉese elmeti pli altan postulon al la altniveluloj por eviti ilian memkontentecon, doni al ili pli multajn hejmtaskojn kaj peti ilin helpi aliajn. Dume la instruisto devas ofte kuraĝigi la malaltnivelulojn, konfirmante ilian progreson, por eviti ilian humiliĝon, kaj helpi ilin post leciono.

11. En la komenca periodo, la instrua aranĝo devas esti malstreĉa, por ke la malaltniveluloj ne renkontu tro grandan malfacilon, sed starigu memfidon kaj akiru elementajn sciojn. Tia aranĝo estas utila ankaŭ por la alt- kaj mez-niveluloj. Ili povas pli bone posedi la lingvon.

Unuvorte, oni devas konsideri la diferencon inter la lernantoj kaj zorgi pri ĉiuj. "En ĉiu brusto estas sia gusto." Estas malfacile kontentigi ĉiujn. Tamen se la instruisto povas profunde esplori la kondiĉojn de la lernantoj kaj senĉese plibonigi siajn instruajn metodojn, estas eble kontentigi la plejparton de la lernantoj.

RECENZO

Widerberg, Siw: La knabino kiu ne volis iri al la infanejo.

Orig. titolo: Flickan som inte ville ga till dagis. Desegnis: Torudd, Cecilia. El la sveda tradukis: Markheden, Malte.
Danio: Progreso Eldonejo, 1988 — 33p. 23.5cm, ilustr. kolore.

La libron konsistigas multe da ĉarmaj, koloraj desegnaĵoj el la vivo de tripersona familio (patro, patrino kaj ĉ. trijara filino) kun malmulte da teksto. La rakonto akompanas la vivon de la familio de mateno ĝis vespero, resp. tiun tempon, kiun ili pasigas kune, nome la matenon kaj la vesperon.

Tio povus esti tre konvena tempo por infanlibro, ankaŭ por lingvolernado en frua infanaĝo, des pli, ĉar la lingvaĵo de la teksto kongruas al lingvouzo de infanoj: pluraj simplaj frazoj, ripetadoj, personigoj (ekz-e *la ŝtrumpoj... absolute ne volis esti sur ŝiaj piedoj*). Ankaŭ la situacio povas esti konata, bedaŭrinde, al multaj infanoj, t.e. ke ili devas viziti infanvartejon, kvankam ili matene tute ne volas tion, pro tio ili kaŭzas plej diversajn obstaklojn, por malebligi, sed almenaŭ prokrasti la ekiron de la hejmo kaj la eksiĝon de la gepatroj. Pluraj nacilingvaj infanlibroj prilaboras tiun ĉi temon havante la celon ŝatigi la infanĝardenan vivon al infanoj. Sed tiu ĉi libro, ŝajne ne apartenas al la plej sukcesaj en tiu ĝenro.

El inter 32 paĝoj 27 priskribas kaj desegnas psikan streĉon, spiton, *duelon* inter infano kaj gepatroj, haston, nervozon, kaj nur 5 paĝoj radias kontenton, kvieton, serenon, gajon: 3 paĝoj en la infanejo, tamen tiu havas tro malmulte da teksto, do rekompence oni devas detale priskribi la bildojn por konsciigi al infanoj, ke indas gaje iri al la infanĝardeno. Sur 2 paĝoj la patro rakontas fabelojn vespere en la lito, resp. la knabineto ekdormas.

Mi inversigus la proporcion: maksimume 5 paĝoj temu pri negativaj kaj 27 pri pozitivaj emociaj rilatoj de infaneto al la gepatroj, resp. al la cetera medio. Alie infano, kiel tiu ĉi knabineto, povus opinii, ke plenaĝuloj volas ĉion kontraŭ la deziro de infanoj, kaj la spito nur kreskas en ili.

La frazstrukturoj lasas senti, ke la teksto estas tradukaĵo, ekz-e...

kaj la knabino ja devis iri al la infanejo,
kvankam ŝi tute ne volis
kaj ankaŭ kvankam la patrino kaj la patro,
eĉ ili, ne plu volis,
kiel nun fariĝis
por ĉiuj ne, ne, ne
en ĉiu tiu tago,...

Sed se fino bona, ĉio bona; ni esperu, ke en la sekvanta tago ŝi pli volonte ekiros matene al la infanejo.

Ĉiukaze la Esperanta porinfana literaturo pliriĉiĝis per bela volumo.

Barcsay Zsuzsa

UNIKA OKAZO VIZITI LITOVION!

La oka Internacia Metodika Seminario (IMS) de Esperanto-instruado

Litova Esperanto-Asocio {ab. jas 167, SU-233000 Kaunas; tel. 208503} invitas vin partopreni la okan IMS, kiun ĝi organizas interkonsente kun ILEI kaj sub ĝia aŭspicio en Kaunas de 5a ĝis 11a de novembro 1990. (alveno en la 4a.)

Partopreno: La seminarion rajtas partopreni funkciuloj de ILEI kaj diversgradaj E-instruistoj kaj -pedagogoj el la tuta mondo kaj ĉiuj aliaj interesatoj. La nombro de partoprenantoj ne estas limigita. Part-tempa partopreno estas nedezirinda. Pliajn aliĝilojn petu de Litova E-Asocio.

Loĝado: En studentaj komunaj loĝejoj en 2- aŭ 3-litaj ĉambroj. Komunaj kuirejoj, duŝejoj k.s. Hotela loĝado eblas, sed eksterlandanoj devas por tio pagi ĉ. dekoble tiom, kiom sovetianoj.

Prezoj: 130 rubloj, US$100 aŭ 200 guldenoj. Membroj de LEA pagos 100 rublojn. Tiu pago inkluzivas student-hejman loĝadon kaj tri restoraciajn manĝojn tage dum 7 tagoj (unua manĝo vespere de la 4a, lasta tagmeze de la 11a) partoprenon en la faka programo, ekskurson kaj la kulturan programon.

Krompagoj: Eksterlandanoj dezirantaj loĝi en 2-lita hotel-ĉambro pagas aldone 160 rublojn, US$130 aŭ 260 gld. En unu-lita ĉambro 250, 220 kaj 440 respektive.

Pagmaniero: Partoprenantoj el okcidentaj nesocialismaj landoj bv. pagi al la konto *litv-s* ĉe Universala Esperanto-Asocio per konvertebla valuto ĝis la 1-a de septembro 1990. Sovetiaj partoprenantoj bv. sendi la monon en rubloj al konto 4700644 de Litova E-Asocio ĉe Sociala Banko, fako de Kaunas, kodo 751575 ĝis la sama dato. Partoprenantoj el aliaj socialismaj landoj pagas per rubloj surloke. Kaze de nepartopreno la kotizo ne estas repagebla. Prelegantoj havas senpagan restadon. Vojaĝkostojn al Litovio kaj reen pagas la partoprenanto mem aŭ la sendanta organizaĵo.

Aliĝo: Trovu aliĝilon ĉi-kune. Sovetianoj aldonu kvitancon por pruvi pagon de la kotizo (ankaŭ aliaj, se eble).

Programo: Fakaj prelegoj, diskutoj, model-lecionoj, forumoj k.s. en plenkunsidoj kaj en sekcioj, spert-interŝanĝo. Interkona vespero, ekskurso tra la urbo kaj laŭ Zamenhofaj kaj Esperantaj lokoj en Kaunas, vesperaj kulturaj programeroj en Esperanto, gazetara konferenco, baza konatiĝo kun la fascina litova lingvo, ekspozicioj, libroservo, filmoj, lumbildoj, instruado de kantoj ktp.

Kadrotemoj: laŭ la propono el la 7a IMS:

A: Teoria temo: Ĝeneralaj psikologiaj faktoroj en la fremd-lingva instruado, rolo de konigaj, afekciaj, volaj procezoj.

B: Praktika temo: Enlingvaj interferoj en Esperanto: ilia atento laŭ lingvistikaj kaj metodikaj principoj montritaj per model-lecionoj.

AB: Teori-praktika temo: La rolo de lernolibro kiel ĉefa instruhelpilo en la instru-procezo; kompletigaj instruhelpiloj (prezento kaj analizo de ekzistantaj kaj pretigataj instruhelpiloj).

Proponojn pri prelegoj kaj faka gvidado sendu ĝis la 1-a de septembro al LEA. La prelegaro poste aperos en speciala volumo.

Vizo: Partoprenantoj el socialismaj landoj vizojn ne bezonas. En problemkazoj kontaktu la organizantojn; LEA povas sendi oficialan invitilon. Partoprenantoj el nesocialismaj okcidentaj landoj nepre donu ĉiujn aliĝile petitajn informojn, inkluvize de la Ambasado, kie la vizo estos petata. LEA sendos al tiu Ambasado teleksan invitilon, peton eldoni vizon al ĉiu unuopulo kaj krome liberigi ĉiun de la deviga monŝanĝo.

Kontakt-adreso: Litova Esperanto-Asocio, ab. jaŝ. 167, SU-233000 Kaunas C, Litova SSR. Oficeja telefono: 208503.

Informiloj: Dua informilo kun detala programo aperos en septembro 1990.

Bonvenon al Litovio!

Organiza komitato de IMS
31 jan 1990.

Dek fabeloj

Legolibro por grupa legadode Charlotte Kohrs kaj Dorothy Kruger

Jen nova 36-paĝa grandformata lernilo eldonita de 'La Tigro: Libroj en Esperanto, 3876 Belmont Avenue, San Diego, CA 92116, Usono. Ĝi prezentas dek popolajn fabelojn en dialoga formo, ĉiu kun tre allogaj desegnajoj de Alan Henderson. La kompostado kaj preskvalito estas laŭdinda, la libro tre taŭgas por aktivigi lernantojn inter la aĝoj de 8 kaj 14. Enkonduke ni trovas klarigojn kaj sugestojn por la instruisto; post ĉiu fabelo sekvas vortlisto kun anglaj tradukoj, fine oni prezentas korelativojn en la fabeloj helpe de anglaj tradukoj, sed krom tio ĉio estas Esperant-lingva. Librofine troviĝas kvin paĝoj da aktivigaj ekzercoj. La verko ja ne estas memstara lernolibro en la kutima senco, ĝi estas aktiviga legolibro por post-komencantoj, ja didaktike strukturita, ĝi aparte valoras por montri kaj ekzercigi la uzon de afiksoj en kuntekstoj. La esperantistoj en San Diego aperigas ankaŭ gazeton 'Infanoj en la mondo' kaj aliajn instru-helpilojn por lernantoj, kiujn ni provos prezenti pli detale estonte. Kiu volas ricevi specimenon de tiu gazeto, skribu al la supra adreso.

Aliĝilo 8a IMS

sendu ĝis la 1-a de septembro 1990 al Litova Esperanto-Asocio, ab. jaŝ. 167, SU-233000 Kaunas C, Litova SSR, Sovet-unio. Skribu preslitere.

1. Nomo, familinomo: . . . . . .

2. Sekso: .... 3. Telefonoj (hejma, ofica): . . . . . .

4. Hejma adreso (kompleta kun poŝtkodo) . . . . . .

....

5. Naskiĝdato:.....,.....6. Scienca grado aŭ titolo . . . . . .

7. Civitaneco . . . . . .

8. Pasporta numero . . . . . .

9. Profesio, specialaĵo . . . . . .

10. Laborloko, studloko, posteno . . . . . .

11. Aktivado movada . . . . . .

12. Jaro de esperantistiĝo: ..... 13. Membro de ILEI: jes/ne

14. Mi volas kontribui al la programo per ... .
(Bv. aldoni detalojn kune kun la aliĝilo)

15. Mi _____ a) sendis la kotizon al la konto litv-s ĉe UEA .
_____ b) sendis ĝin al la konto de LEA en Kaunas.
_____ c) pagos surloke post alveno .

Indiku la sumon, valuton kaj pagodaton: . . . . . .

16. Mi petas LEA sendi al mi invit-leteron.

Mi petas LEA teleksi invitilon al la soveta Ambasado en .....

17. Rimarkoj . . . . . .

....

Subskribo ..... Dato: .....

RAPORTO DE LA ESTRAR-KUNSIDO DE ILEI,
Budapeŝto 22-25 februaro 1990

Kvin el la sep estraranoj de ILEI kunvenis en la hungara ĉefurbo fine de printempa februaro por trakti ampleksan tagordon. Dum pli ol 25 kunsidhoroj ili traktis ĉ. cent-punktan tagordon. En la sabato ili krome ĉeestis la Pedagogiajn Tagojn de la hungara ILEI-sekcio, kiu logis ĉ. 70 instruistojn per prelegoj ĉirkaŭ la temo 'Transitiveco de verboj' kaj serio da model-lecionoj kun infanoj el Esperantaj klasoj. Du estraranoj kontribuis fake al tiu kunveno kaj en la vespero la estraro kolektive prezentis sin kaj la Ligon al la ĉeestantoj. Estrarano Zhang Danchen ne povis ĉeesti pro la distanco, Audrey Childs-Mee pro malsano, sed per serio de leteroj ŝiaj vidpunktoj influis la diskutojn. ILEI dankas al la hungara sekcio pro la invito partopreni en tiu aranĝo kaj al HEA pro disponigo de taŭga kunvenejo kun oficejaj faciligoj por la kunsidado.

Post bonvenigo, fikso de kunven-detaloj kaj tagordo, kontrolo de farendaj taskoj laŭ la monata skemo el Caerleon, la kunsido elektis Malcolm Jones (MJ) protokolanto.

1. Membraro kaj Landaj sekcioj:

1.1 Laŭsekciaj raportoj : nivelo de aktivado, funkciado de sekciestro, kotizado, membronombro, enlanda kotizo konata? ILEI havis 734 membrojn en 1989 laŭ la lasta kalkulo (Usono 88, Italio 71, FR Germanio 66, Svedio 59, Nederlando 58, Hungario 40)

1.2 Decidoj pri unuopaj sekcioj: Akceptite reprezentanto por Hinda Unio, s-ro Abani Halder. Necesas aktivigi la sekcion en Japanio, kaj fondi aŭ refondi sekciojn en Greklando, Portugalio, Rumanio, Kolombio kaj se eble en Kubo. Sekciestraj ŝanĝoj okazis en Finnlando, Pollando kaj eble en Usono.

1.3 Demandilo: Sekcioj estos petataj raporti pri la strukturo de la asocio, la funkciuloj, la decid-organoj, la jarkunvenoj, la rilato kun la LA de UEA, la agado, la membraro (ekz. kiom da aktivaj instruistoj ĝi entenas, kaj kiom el la enlandaj membroj estas ankaŭ membroj de la internacia ligo — kelklande la du ne estas devige ligitaj), la kvanto kaj kvalito de instruado (ĉar la rekta enketado donis tre nekompletajn rezultojn) kaj pri la nacivaluta kotizo (kiom el ĝi restas ĉe la sekcio, kiom pluiras al ILEI). Aldone, ĉu prelegantoj en lernejoj bonvenas, ĉu estas interesiĝo pri ekzamen-sesio kaj aliaj deziroj pri kunlaboro. La celo estu aperigi en IPR2 resumon de la respondoj, por ke ni havu laŭlandan raporton por diskuti en Kubo. Statute la sekcioj estas devigataj raporti ĉiujare — la demandilo sistemigos tion.

1.4 Konsistigo de komitato en Hanabanilla: La Komitato konsistas el ĉiu sekciestro aŭ ties skribe anoncita anstataŭanto. Sekciestroj ne povontaj ĉeesti bv. serĉi samlandanon kiu ĉeestos kaj povos esti tiu anstataŭanto. Anoncilo pri anstataŭado dissendiĝos kun la demandilo.

2. Rilatoj kun UEA

2.1 Eduka ĉapitro por la UEA-jarraporto: Pretigos tion MJ laŭ temlisto verkita dumkunside.

2.2 Interkonsento kun UEA: Kiel komisiite, Stefan MacGill (SMG) cirkuligis malneton antaŭ la kunsido, kiu post pluraj modifoj estis akceptita de la estraro kaj estas nun studata de la Komitato de ILEI kaj la Estraro de UEA. Nia Komitato poŝte voĉdonas pri ĝi. Se tiuj du

organoj aprobos tiun 11-punktan dokumenton, ĝi dissendiĝos al la Komitato de UEA ĝis junio por trakto en Havano.

2.3 Aliĝo al UEA: S-ro Edward Symoens (ES) certiĝis, ke tio ne limigos la sendependecon de ILEI kaj ne riskigos nian formalan rilaton kun Unesko, sekve la Estraro proponas tiun aliĝon kaj voĉdonigas la Komitaton nuntempe pri ĝi – tio povos esti antaŭmetita al UEA kune kun la interkonsento.

2.4 Principoj por komunaj eldonaĵoj: SMG raportis pri la neegala enspezo ĉe vendo de la komune eldonita ekzamena libreto ĉe UEA kiu ekestos post la elĉerpiĝo de ĝia senpage liverita stoko (kaze de vendo al unuopulo enspezo por UEA: 4,40 gld., por ILEI 0,40). Punkto en la supra interkonsento celas starigi pli justan principon tiurilate.

3. Financo

3.1 Financa finkalkulo 1989: ĉi tio aperos en la venonta IPR: la nuna stato montras modestan perdon en la jaraj spezoj, sed modestan kreskon de havaĵoj en la bilanco. La prezentota formo de la kontoj spegulos komentojn kaj sugestojn faritajn en kaj post Caerleon.

3.2 Kotizaltiĝo: la propono el Caerleon estas nun poŝte voĉdonata.

3.3 Buĝeto por 1990: ĝi indikas similan situacion kiel en 1989, sed altigas la estrarajn kostojn iom. Kotizoj kaj la kostoj de IPR restas la ĉefaj elementoj. La plimulto de la novaj aktivecoj estas kovritaj per kompenso de UEA.

3.4 Fondaĵo Szerdahelyi - tion ni lanĉis en la antaŭa IPR, la unuaj donacoj envenis. Listo de donacantoj aperos en ĉiu numero de IPR.

4. Ekzamenoj ekzistantaj

4.1 Sesioj en Ĉinio kaj Ruando: raportis ES. Jara protokolo aperas ĉi-numere. SMG anoncis la unuajn kvar sukcesintojn por 1990 el la januara sesio en Kultura Centro Esp-ista..

4.2 Elementa nivelo: Propono revizii la poentodividon en la skriba testo: 30 eseo + 25 lega kompreno + 25 aŭskulta komp. + 10 kulturo + 10 diktaĵo estas akceptita.

4.3 Meza nivelo: Simila propono akceptita: 30 eseo + 25 lega komp. + 25 aŭskulta komp. + 20 kulturo. Tio ankoraŭ pli gravigas la rolon de la kulturaj konoj.

4.4 Komuna aprobo de testoj verkitaj depost Caerleon

4.5 Kriterioj por ekzamenado en la parola ekzameno, verkitaj de SMG kaj C. Gacond akceptitaj kaj dissendotaj al IRE.

4.6 Manieroj doni gvidon al ekzamenantoj: necesas pliaj kriteriaj listoj kaj gvidiloj. Se estas sufiĉaj partoprenantoj en Hanabanilla ni organizos seminarion por ekzamenantoj aldone al la administra kunsido. Similaĵo povus okazi en la 8a IMS en Kaunas.

4.7 Konsistigo de IEK/IRE: - Post la raporto de ES pri la ekzamena sesio en Nanning (nov 89), nia estrarano Zhang Danchen estas akceptita en la sepa loko de IEK. Novaj IRE-anoj estas akceptitaj: Li Weilun kaj Hu Guozhu, Georges Lagrange, Jeannine Vincent, Pierre Babin kaj Zsófia Barossné-Kóródy. Petis retiriĝon el IRE d-ro Detlev Blanke.

4.8 Estontaj sesioj estis akceptitaj (kondiĉe je kompletigo de la praktikaj preparoj) en Nederlanda Junulara Renkontiĝo en pasko (ekzamenos Roel Haveman kaj Arjen-Sjoerd de Vries) en Grésillon (10-21 sub gvido de supre nomitoj), en KCE aprile, en Kungälv, Svedio kaj San-Francisko en junio (gvidos SMG), en Zadar, Jugoslavio en Alp-Adria renkontiĝo kaj en la UK julie.

4.9 Ekzamenoj por blinduloj: kunlaboro kun LIBE laŭ propono de s-ino Nora Moerbeek; en IEK Malcolm Jones respondecos pri tio, cele al unua tia sesio en Hanabanilla.

4.10 Postulara teksto por traduko nacilingven: Kiel komisiite, SMG preparis dek-linian teskton por klarigi la celojn kaj signifon de niaj ekzamenoj al eksteraj instancoj. La teksto estis ne nur aprobita de la estraranoj, sed tradukitaj de ili en siajn naciajn lingvojn. Tiuj tekstoj aperos en IPR kaj tradukoj al aliaj lingvoj estas bonvenaj.

5. Ekzamenoj superaj

5.1 Diskuto pri la skribaj proponoj de SMG/Gacond kaj d-ro Till Dahlenburg (TD). Akceptite, ke altnivela gramatik-leksika antaŭtesto estu, same kiel la devo verki anticipe eseon/di-

24a INTERNACIA KONFERENCO DE

I.L.E.I.

(Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj)

Internacia Esperanto-Centro, Hotelo "Hanabanilla", Kubo

21-28 julio 1990



Kadrotemo de la konferenco:

"Naciaj trajtoj de la instruado kaj lernado de Esperanto"

- Tipaj eraroj en Esperanto depende de la gepatra lingvo de la instruanto/lernanto, sur la kampoj: fonetiko, morfologio, vortfarado, sintakso, leksiko;
- Landaj specifaĵoj en la kvalifikado kaj pliperfektigado de Esperanto-instruistoj;
- Eksterlingva enhavo de landaj lernolibroj, instru- kaj lern-helpiloj kaj aŭtodidaktigaj materialoj;
- Tradicie aŭ moderne determinitaj metodikaj specifaĵoj en fremdlingvo-instruado sub aparta konsidero de Esperanto-instruado.

Aliĝadreso: M. Jones, 41, Causeway, Chippenham, Wiltshire, SN15 3DD, Anglujo. Tel.: 0249/656041.

La loko

La hotelo "Hanabanilla" troviĝas meze de la insulo Kubo sur la montoĉeno "Escambray", ĉe la lago "Hanabanilla". Pro la alteco de la loko, la klimato eĉ somere estas agrabla, kaj la ĉirkaŭanta natura pejzaĝo estas raviga kaj impona. La distanco de Havano estas proksimume 300 kilometroj. En la procinco "Villa Clara", kie situas "Hanibanilla", estas entuziasma kaj vigla esperantistaro.

La konferencejo

La hotelo "Hanabanilla" disponas pri:
- 1-, 2-, kaj 3-litaj ĉambroj;
- klimatizilo, radio kaj bano en ĉiu ĉambro;
- televidilo je ĉiu etaĝo;
- klimatizita restoracio kaj trinkejo;
- alia restoracio kaj trinkejo, naĝejo kaj kabaredo.

Kotizoj

La prezoj inkluzivas:
- 7 tranoktojn en "Hanabanilla";
- transporton Havano-Hanabanilla-Havano per komuna buso;
- matenmanĝon kaj unu manĝon tage;
- la tutan konferencan programon, inkluzive de unu faka ekskurso.

unulita ĉambro	:	564 NLG (guldenoj)
dulita ĉambro	:	473 NLG
trilita ĉambro	:	282 NLG

Bonvolu elekti la por vi plej taŭgan pagmanieron:
a. al la kasisto de ILEI: poŝtĝirkonto 682117-7 (Stockholm) "La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby, Svedujo.
b. per ĉeko al la sama adreso.
c. al UEA (pĝk 378964), indikante "por la 24a ILEI-konferenco", kodo: ilei-k,
UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
ĉ. aliĝontoj el netranspagipovaj landoj bonvolu aliĝi nun provizore, kaj vi ricevos poste pli da informo pri la ebleco pagi almenaŭ parton de la kotizo per enlanda mono.

Pliaj informoj

Aliĝintoj ricevos pli detalajn informojn pri la programo, kursoj, la komuna vojaĝo.
Laŭbezone Cubatut povas aranĝi loĝigon en Havano antaŭ aŭ post la konferenco. Tiun eblecon ni ankaŭ klarigos al aliĝintoj.

Ekzamenoj

La elementaj kaj mezaj ekzamenoj de UEA/ILEI estos kompreneble oferataj en la Universala Kongreso, sed se estas sufiĉa interesiĝo, ni povos proponi ilin ankaŭ en la ILEI-konferenco. Pliajn informojn pri la ekzamenoj vi trovos en la eldonita libreto (6,60 gld. ĉe UEA). La ekzamenkotizo varias laŭlande de 25 ĝis 40 guldenoj. Kiu volas kandidatiĝi, bv. indiki tion sur la aliĝilo.

Cseh-Seminario

Kadre de la 24a ILEI-Konferenco, Internacia Esperanto-Instituto (IEI), kunlabore kun ILEI, okazigos Ĉe-seminarion por estontaj Cseh-instruistoj, kiuj plenumos ĉiujn partoprenkondiĉojn, nome: sukcesajn partoprenojn en seminarioj A kaj B, gvidadon de tuta Cseh-metoda kurso, raporton pri ĉi tiu al IEI antaŭ 1990-05-01. La partopreno estas aparte pagenda al IEI. Pliaj informoj haveblas de: IEI, Riouwstraat 172, 2825 HW Den Haag, Nederlando. Se eble, bonvolu aldoni al via informpeto internacian respondkuponon.

ALIĜILO

Mi aliĝas al la 24a Konferenco de ILEI en Hanabanilla, 22-29 julio 1990.

Familia nomo ..... Antaŭnomo .....

Profesio ..... Naskiĝdato ..... Sekso .....

Strato ..... n-ro .....

Poŝta kodo ..... Loĝloko ..... Lando .....

Subskribo .....

Bonvolu krucsigni

Mi mendas ĉambron unulitan ☐ / dulitan ☐ / trilitan ☐ kaj deziras loĝi kun ..... kiu ankaŭ aliĝas.

Mi manĝos vegetare: jes: ☐ ne: ☐

Mi sekvas jenan dieton .....

Mi partoprenos la Cseh-seminarion C kaj jam pagis al IEI ☐
sed ne pagis al IEI ☐

Mi intencas partopreni la krompagendan ekzamenon elementan ☐
mezan ☐

Aliaj deziroj .....

La kotizon de ..... guldenoj mi pagis je dato .....
per maniero a. ☐ b. ☐ c. ☐ ĉ. ☐.

Mi intencas partopreni en la Universala Kongreso en Kubo:
jes ☐ ne ☐

Mi alvenos al Kubo je la komenco de la konferenco: jes ☐

Subskribo ..... Dato .....

Spaco rezervita al LKK

La aliĝilo alvenis je ..... Aliĝnumero .....

La pago alvenis je ..... Sumo .....

Ankoraŭ pagendas .....

Ĉambronumero ..... kun .....

sertacion/laborajon kaj ĝin buŝe kaj publike defendi en la parola parto de la ekzameno. Cetere estu skriba parto kaj parola parto enhavanta tri taskojn.

5.2 Regularo por la supera nivelo: SMG estas taskita krei proponon.

5.3 Formulo de postularo. TD estas taskita prepari tion. Ambaŭ dokumentoj cirkulu ĝis la someraj kongresoj.

5.4 Formulo de specimenaj demandoj: Unuavice SMG kaj TD okupiĝos post plenumo de la supraj du devoj.

5.5 Elekto de prezidanto de Supera Rajtigita Ekzamenantaro (SRE). Tiu instanco estas ankoraŭ nur proponata. Ĝi estu tute aparta disde la organoj de la elementa kaj meza ekzamenoj (IRE kaj IEK). Proponite, ke TD iĝu prezidanto kaj formanto de SRE. TD malakceptas, argumentante, ke nur post la konsistigo, ĝi mem elektu sian prezidanton.



Ses el la sep estraranoj pozas en la konferenco en Kerkrade, Nederlando, tuj post la elektiĝo al la nuna duon-plenumita mandato. De maldekstre: Bertil Andreasson, Audrey Childs-Mee, Stefan MacGill, Edward Symoens (prez.), Malcolm Jones kaj Zhang Danchen. Ne ĉeestis Till Dahlenburg.

5.5 Elekto de sekretario por SRE: SMG anoncis malpretecon tion plenumi aldone al la devo sekretarii en IEK. Alia sukcesa propono ne estis. Post formiĝo SRE elektu sian propran sekretarion, sed tuj necesas sekretario por organizi la fondon de SRE surbaze de la nova regularo. Konsentite peti s-inon Zsuzsa Barcsay (ZsB) entrepreni tiun taskon.

5.6 Proponoj por ekzamenantoj: Restis la listo de eblaj superaj ekzamenantoj formulitaj en KCE septembre, ZsB alskribu ilin.

5.7 Decido pri pluaj paŝoj: ILEI-estraro akceptu regularon kaj postularon ĝis majo, ili estu senditaj al ILEI-sekcioj kaj UEA-komitatanoj ĝis junio, por ke tiuj komitatoj traktu la proponojn en Kubo somere. Tio ebligos aperigon de nova ekzamena libro ĝis la jarfino, kiu aperigu ne nur detalojn de la supera nivelo, sed de ĉiuj tri niveloj, kune kun novaj specimenaj testoj elemente kaj meze.

6. Kongresoj, Aranĝoj

6.1 UK: Tago de Lernejo: Tio okazos marde 17an de julio 90, de 0900h ĝis 1700h kun kvin prelegoj kaj diskutrondo pri la temo 'Naciaj specifajoj en internacia lingvo', kun fine landaj raportoj kaj registriĝo kaj antaŭtesto por la ekzamenoj. Detaloj aperis jam en la Dua

Bulteno laŭ nia teksto, pliaj aperos en la Kongresa Libro: prelegemuloj bv. anonci sin al TD tuj.

6.2 UK: Aliaj aranĝoj: Nia fak-kunsido okazos lunde 0900-1100 en ĉambro Lapenna, kie i.a. la eduka rezolucio estos traktita. La skribaj ekzamenoj okazos en salonoj Miyamoto kaj Sekelj ĵaŭde ekde 1300h; parolaj ekde 1500h en vendredo. La Ĉe-kurso sub gvido de mag. I. Szanser okazos ĉiutage, kiel ankaŭ konversaciaj rondoj. La informfluo de UEA ĉirilate estis laŭdinda — ĉio funkciis laŭ niaj proponoj, inkluzive de la ebleco anticipe kaj kun rabato anonciĝi por la ekzamenoj. Tio igas nin preskaŭ pardoni ilin pro la ellaso de nia konferenco el la kalendaro en la januara numero de 'esperanto'.

6.3 ILEI-konferenco: La stato de aliĝoj estas ege modesta; tion la supra ellaso ne helpos. Urĝe necesas varbi pli da kongresanoj (revidu la aliĝilon en IPR 89/3!). MJ kaj ES raportas, ke la poŝtaj rilatoj kun Kubo estas tre malbonaj; necesos ekuzi la teleksilon de UEA por havi fidindajn kontaktojn. TD alskribis plurajn proponitojn por prelegi en Hanabanilla (kaj en Tago de la Lernejo) sed rikoltis ĉefe malakceptojn. Li kontaktos ankoraŭ pli da personoj, surbaze de aliĝlistoj ricevotaj. Siatempa propono pri konferenca gimnazio de ZsB ne estos plene realigebla en Hanabanilla, sed ni klopodos prezenti la koncepton kaj ĝin praktike montri per organizado de kelkaj model-lekcioj (ekz. dum unu post-tagmezo). MJ traktos kun LKK pri la ebleco akcepti kelkajn ŝlosilajn gvidantojn, prelegantojn kaj sekciestrojn el socialismaj landoj en la konferenco pere de pesa pagado (do, pago inter du socialismaj valutoj kaj ne tra por ili neakireblaj okcidentaj valutoj). Por UK tiaj interkonsentoj okazis, sed ne por nia konferenco. I.a. temas pri partopreneblo por la gvidonto de la Ĉe-seminario en Hanabanilla. Por varbado sekciestroj ricevos stokojn de aliĝiloj, MJ preparos gazetaran komunikon, TD kreos priskribon de la konferenca temo.

6.4 Jubilea konferenco 1991. Bertil Andreasson (BA) korespondis kun popola altlernejo en Voss, vilaĝo de 14000 personoj ĉ. 80 km. de Bergen en belega akvofala, fjorda regiono de Norvegio, sur la ĉeflinio al Oslo. Post la raporto la estraro principe akceptis okazigi la 25an konferencon tie de la 3a ĝis la 7a de aŭgusto 1991 (post la UK, sed dum unu tago malpli ol kutime) kaj komisiis BA plu trakti, i.a. pri ebleco oferti restadon surbaze ne nur de plena pensiono sed ankaŭ de duon-pensiono.

6.5 Internacia Metodika Seminario (IMS) okazos en Kaunas, Litovio, kiel esperite, sed en novembro 90. ILEI kuraĝigas siajn membrojn trafi ĉi tiun unikan eblecon sperti la renoman IMS kaj landon meze de epokfara transiro. Plenaj detaloj kaj aliĝilo en ĉi tiu IPR. Ebleco de komunaj alveturoj esplorataj.

6.6 Tria pedagogia kurso: La estraro komisias al mag. I Szanser kaj Zsófia Baross-Kóródy kunlabore gvidi tiun kurson en KCE aŭguste. kune kun aliaj gastprelegantoj invititaj de KCE, surbaze de deklaro farita de KCE kaj nun subtenita de la ILEI-estraro.

7. Eksteraj rilatoj

7.1 Rilatoj kun Unesko: Nia reprezentanto F. Lo Jacomo ricevis proponon, ke ILEI aperigu plurpaĝan artikolon kun foto en 'Unesko Kuriero' kaj proponis la taskon al SMG, kiu ĝin sukcesis transdoni al ES.

7.2 Asocio pri Naturdotitaj infanoj: ES restas en kontakto, ĉefe pri elpaŝoj kadre de ilia konferenco en Hago en julio 1991.

7.3 Projekto Erasmus: ES daŭre kunlaboras, por ke ni reprezentiĝu en superaj edukaj rondoj en la EK.

8. Eldonado

8.1 Superrigardo de ekzistantaj propraj eldonaĵoj: esence la ekzamena libreto (jam unufoje represita) kaj la inform-kajeroj de ES en kvar lingvoj.

8.2 Libro 'Glotodidaktikaj...' (la kursmaterialo de mag I. Szanser por la pedagogiaj kursoj). La unua parto preskaŭ elĉerpiĝis, la dua parto aperis ĉe KCE en julio 1989. ILEI ricevis de Fondaĵo Carson sumon por helpi la eldonadon kaj laborbuĝeton de UEA. KCE retiris sian siatempan pretecon eldoni la materialon siakoste. La estraro nun akceptis repreni la taskon kaj ricevis la reviziitan manuskripton el KCE. Tion transprenis TD, kiu interrilatos kun la aŭtoro por povi liveri ĝin al kompostejo en traktebla formo. SMG pretigos kontrakton kun la aŭtoro.

8.3 'Esperanto dinamike': SMG prezentis eldon-proponon por internacia lernolibro, kaj la nunan staton de la laboro. ILEI aŭspicios la libron kaj pretas konsideri partopreni la eldonadon kune kun HEA kaj UEA.

8.4 Aliaj eldon-proponoj: ES pretigis 40-paĝan manuskripton pri la propedeŭtika valoro de Esperanto (t.e. ĝia valoro prepari lernanton por aliaj postaj studoj, ekz. de alia fremda lingvo). Tio formos parton de la projekto aliri edukajn instancojn. Ĝi estas proponita al UEA por aperigo en la serio 'Esperanto-dokumentoj'.

8.5 Libroj didaktike utilaj, kiujn ni subtenu per senpaga aŭ interŝanĝa reklamado. 'Esperanto por ni' (Mikulas), 'Dek fabeloj' (Kohrs/Kruger, San Diego), 'La tuta Esperanto (Seppik). Mankas informoj pri la intenco de UEA reeldoni la metodikan libron de Rakusa en Sovetunio.

8.6 Eldona fako: trovo de eldonista fakulo, financa bazo, eldona politiko, distribua reto. Pri tiu lasta necesas konkretigi bonajn rilatojn kun Flandra Esperanto-Ligo. Pri la cetero eblas vidi pluiron kadre de la plano por oficejo/oficisto.

8.7 Internacia Pedagogia Revuo: La estraro kaj la redaktoro István Ertl interparolis dum horo; pluraj novaj proponoj estis lanĉitaj kaj akceptitaj. Pli da entajpaj fortoj estas akirataj. Ekspedaj problemoj malkovritaj postulas pli rektan kunlaboron inter BA kaj GCA.

9. Statuto

Propono de revizio de la Statuto kaj Regularo estis laŭ komisio ricevita de s-ro Oene Hoekstra kaj studita detale, kune kun la komentoj de estraranino Audrey Childs-Mee. La unua duono estis reviziita de la Estraro, la dua parto ricevis atenton de unuopaj estraranoj kaj estos ankoraŭ prilaborita. SMG komputile kunigos la proponojn kaj reagojn por ebligi distribuon antaŭ Hanabanilla, kie la Komitato povos ĝin pristudi. Definitiva trakto povos okazi nur flanke de la asembleo kunvokota en Voss en 1991.

10. Diversaĵoj

10.1 Interetna vortaro: Ne venis raporto.

10.2 Historio de ILEI: Restas valida la alvoko farita en IPR 89/2.

10.3 Honoraj membroj: Ne alvenis proponoj.

10.4 Reto de prelegantoj, instruistoj, kiuj kapablas viziti lernejojn en eksterlando: Tion ni kunordigu tra IPR. Kiuj LS volus akcepti tiajn?

10.5 Estontaj estrarkunsidoj: En Hanabanilla antaŭvideble ĉeestos nur ES, SMG kaj BA, en Kaŭnas nur ES, SMG kaj TD. Decidite nomi tiujn oficialaj estrarkunsidoj, sed ĉar ili estos senkvorumaj, ĉiu decido devos esti poŝt-voĉdone ratifikita. La venonta plena kunsido okazos februare de 1991 (Benelukse, Berline aŭ Malme).

11. Planoj, perspektivoj

11.1 Plano Symoens pri samtempa kelklanda aliro al instancoj kaj enkonduko de Esperanto en lernejoj: tio grandparte dependas je trovo de oficisto.

11.2 Centra Oficejo de ILEI: Konsentite, ke oficistaj kandidatoj pri gravas ol fizika oficejo, kaj ke la financa bazo ankoraŭ mankas. Du proponoj alvenis, unu estos aparte esplorita en la venontaj monatoj, alloga interalie pro la ebleco iom-post-iom funkciigi ĝin. ES kaj SMG formulos projektojn kaj taskojn prove transdoneblajn, BA esploros financajn eblojn.

* * * * *

smg 90 02 26

KARLSKOGA POPOLA ALTLERNEJO

havas 8-semajnan Eo-kursojn dum la tuta jaro. Oni studas Eon en klaso minimume 20 horojn semajne.

Ni vere bonvenigas internacian partoprenon por pli nature havi Eon kiel laborlingvon. La gelernantoj ankaŭ havas eblecojn elekti aliajn temojn, ekz. ceramikon, teksadon, muzikon, bazan komputadon ktp.

La lernejo bonvenigas ĉiujn aĝojn ekde 18. La gelernantoj loĝas en modernaj, unulitaj ĉambroj (inkl. duŝo kaj necesejo) kun komuna kuirejeto kaj TV-ĉambro. La loĝejoj situas bele apud lago kaj alloga naturo nur 1 kilometron de la urbo Karlskoga. Ĉiuj manĝas kune en lerneja manĝejo. Datoj:

27/08 – 19/10 1990 Komencanta kurso
22/10 – 14/12 1990 Progresanta kurso
07/01 – 08/03 1991 Komencanta kurso
11/03 – 17/05 1991 Progresanta kurso

Ni ankaŭ havas somerajn kursojn dum unu semajno ĉiun someron en julio:

09/07 – 14/07 1990 kaj
08/07 – 13/07 1991

Proksimume 50 personoj vizitas ilin. En– kaj eksterlandaj instruistoj gvidas la 3 aŭ 4 grupojn diversnivele. Vespere je la kafo ni havas prelegojn, kantadon kaj montras lumbildojn, ktp.

Eksterlandanoj povas viziti parton de niaj longaj kursoj – sed almenaŭ unu semajnon – kaj tiam pagi proporcie al studtempo.

KOSTOJ:

8–semajnaj kursoj ĉ. SEK 3700
Kostoj por lernolibroj ĉ. SEK 150
Somera kurso ĉ. SEK 1400

KARLSKOGA POPOLA ALTLERNEJO
BOX 192
S–691 24 KARLSKOGA
SVEDIO

Ĉiujare Esperanto-grupo de MONTPELLIER

(5 rue Roux, F–34000 MONTPELLIER, Francio) organizas Esperanto-staĝon kun plurgradaj kursoj. En 1989 ega sukceso de la staĝo en Sète (Mediteranea marbordo) kun 80 personoj evidentigas, ke venontjare okazu du staĝoj, tiel ke grupoj de 50–60 homoj pli bone studos kaj ferios en amikeca etoso. Nu, la sola manko temas pri instruemuloj por la tria semajno de septembro. Pri kondiĉoj oni tuj skribu al ĉi supra adreso.

Festivalo de Internacia Kulturo kaj konferenco Celo kaj strategio de la Esperanto-movado



Ĉi-jare la Universala Kongreso okazos for de Eŭropo, tial la estraro de Hungara Esperanto–Asocio aranĝos inter la 04–09 de julio 1990 en Budapeŝto

Festivalon de Internacia Kulturo.

Diference disde la tradiciaj programoj ĉi-foje ne temos nur pri Esperanto-kulturo, sed Eo rolos ankaŭ kiel pera lingvo por aliri aliajn kulturojn. Kadre de la festivalo estos organizata la konferenco

Celo kaj strategio de la Esperanto-movado.

Dum la festivalo la partoprenantoj povos ĝui teatrajn kaj muzikajn prezentadojn, ili povos diskuti pri celo kaj strategio de la movado, ili povos konatiĝi kun la historio de Esperanto-presaĵoj, kaj ili povos viziti unikajn partojn en Hungario.

Partoprenkotizo:
por Orient-Eŭropanoj: 3400 Ft (duonpensiono)
por alilandanoj 250 guldenoj, en hotelo 330 guldenoj (duonpensiono)
Aliĝdatoj: 31-a de marto (laŭ la ĉi supraj prezoj) kaj 1-a de junio (10%-ojn pli)
Organizanto: ESPERTUR, Budapest, Pf.193, H–1368.

ICEM Esperanto

estas pedagogia revuo kies celo estas konigi la modernan pedagogion de la granda franca pedagogo Freinet, kaj samtempe disvastigi nian komunan lingvon Esperanto.

Freinet, kune kun Montessori, Decroly, Dewey, Makarenko, Kozczak, kaj aliaj estis unu el la plej famaj pedagogoj de nia epoko. Li laboris por ke infanoj estu edukitaj en libera, fida kaj feliĉa etoso, sen trudado. Ni provas daŭrigi tiun pedagogion kaj la Freinet-movado posedas anojn en pli ol 35 landoj, pere de la FIMEM (Federacio Internacia de la Movado pri Edukado Moderna).

Nia revuo ICEM Esperanto aperas 4-foje jare (oktobro, januaro, marto, junio). Ĝi havas legantojn en la tuta mondo.

Se vi estas interesita pri nia laboro, vi facile povas aboni ĝin. La prezo de la abono estas 80 FF jare aŭ 15 Internaciaj Respond-kuponoj.

De la 1-a ĝis la 11-a de aŭgusto 1990,

Internacia Renkontiĝo de esperantistaj edukistoj

(Freinet-pedagogio) okazos en sud-orienta Svedio (Hotell SMALAND) je 70 km nord-okcidente de KALMAR (Svedio).
Sin turni al: Paul POISSON – 239 Rue Victor Hugo – F–37540 St CYR sur LOIRE, Francio.

La sesa Sanmarina Universitata Sesio de AIS jam okazis!

Inter la 26-a de aŭgusto kaj la 04-a de septembro 1989 en Borgo Maggiore (Respubliko de San Marino) ĉirkaŭ 90 studentoj kaj akademianoj venis partopreni la Sesan Sanmarinan Universitatan Sesion de la Akademio Internacia de Sciencoj San Marino.

Dum 10 tagoj la partoprenintoj povis studi sekvante sciencajn kaj lingvajn kursojn, prelegojn kaj prelegseriojn en la 6 fakultatoj de AIS, nome kibernetiko, humanistiko, struktursciencoj, filozofio, natursciencoj kaj morfosciencoj. Dum la ĉi-jara sesio AIS pligrandiĝis je du novaj sektoroj. La teknikan inaŭguris doktoro L.C.Zaleski-Zamenhof prelegante pri la progresemaj inĝenieraj teknikoj en maroj kaj sekve fariĝante la unua honora profesoro de ĉi tiu sektoro. La unuan honoran profesorecon de la Arta Sektoro de AIS ricevis Rikardo Ŝulco.

SUS 6 rezultis interalie en la diversŝtupaj ekzamenoj, adaptantaj jam akademian gradon de la studento en sia lando aŭ havigantan ĝin originale surbaze de disertacio en la Internacia Lingvo. Ĉi-jare 4 studentoj akiris bakalaŭran gradon, 7 magistran, 3 doktoriĝis kaj unu originale habilitiĝis en la fako kibernetiko. Paralele kun la studado partoprenantoj ĝuis la kulturan programon, inkluzive prezentadon, fare de Rikardo Ŝulco, de sonetaro *Abismo* kun litografioj de Ĵano Lajpo kaj koncerton de Nikolin' el Namur. La venonta – Sepa Sanmarina Sesio de AIS okazos samloke ekde la unua de septembro ĝis la deka 1990.

Esperanto-aranĝoj planitaj por la jaro 1990 ĉe Internacia Kultura kaj Kleriga Centro, Sobotské Námestie, CS–058 01 POPRAD Tel:(092)32419, 23539

Somera Esperanto-Lernejo (SEL '90) (4 etapoj) julio 01–14, julio 15–28, julio 29– aŭgusto 11, aŭgusto 12–25,
Internacia Lernejo por Esperanto-Funkciuloj (ILEF '90)
aŭgusto 12–25,
INTERKIBERNETIK '90, konferenco de TAKIS (Tutmonda Asocio pri

Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko
septembro 12–14,

Kulturaj Esperanto-tagoj en Poprad
novembro 23–25,

Somera Esperantokurso en JYVÄSKYLÄ 01–06.07.1990

La 23-a Somera Esperantokurso en JYVÄSKYLÄ, Finnlando, okazos 01–06.07.1990. La aranĝantoj estas Somera Universitato de Jyväskylä kaj Esperantoklubo de Jyväskylä. La kursejo estos Universitato de Jyväskylä.

Ĉi-jare instruos redaktorino Éva Farkas el Hungario, tre konata en la internacia Esperanto-movado.


La kursosemajno enhavas du diversgradajn instrugrupojn: por komencantoj 10 horojn kaj por progresintoj 10 horojn. Ambaŭ kursoj estos gvidataj en Esperanto. Krome Esperanto-klubo de Jyväskylä dum la kurso de komencantoj aparte aranĝos libervolan Konversacian Rondon por tiuj, kiuj volas praktiki E-on kaj diskuti pri diversaj temoj kun aliaj kursanoj kaj kun lokaj e-istoj. Tiel la partoprenantoj povas pasigi tutan tagon kune, ĉar ĉiuvespere estos aranĝataj diversaj distraj programeroj, i.a. interkona vespero, rondveturado en la urbo, finna vespero kun saŭno, ŝipkrozado, vespero de la instruisto kaj adiaŭa vespero. Eblas ankaŭ loĝi en la hejmoj de la lokaj esperantistoj.

La aliĝkotizo al la kurso estas FIM 400 kaj ĝi inkluzivas instruadon en ambaŭ kazoj, eblan lernomaterialon kaj la registran pagon de la Somera Universitato. Pri la aliaj kostoj (tranoktado, manĝoj ktp.) ĉiu zorgas mem aŭ pere de kluba kontaktopersono, kiu helpos vin ankaŭ en ĉiuj aliaj problemoj.

Petu pli detalan kursoprogramon kaj E-lingvan turisman prospekton pri la bela urbo Jyväskylä.
Klubaj kontaktopersonoj:

s-ino Seija Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, SF–40630 JYVÄSKYLÄ, tel:(941) 254 609

s-ino Terttu Tyynelä, Taidepolku 6 J, SF–40720 JYVÄSKYLÄ, tel:(941) 612 238



GDREA invitas al Internacia seminario: Esperanto — objekto de akademia instruado kaj esploro 24.04–02.05.1990 en Bad Saarow ĉe Berlin/GDR

En la internacie jam konata kaj luksa seminariejo de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (GDREA), en Bad Saarow, 27.04–02.05.1990, okazos plua internacia faka seminario. La temo ĉi-foje: *Esperanto — objekto de akademia instruado kaj esploro*. Bonvenas fakuloj kaj interesitoj el ĉiu ajn lando.

Depende de la prelegantoj oni planas trakti i.a. temojn kiel ekz.: Historio, nuna stato kaj pluevoluigo de Esperanto-kursoj en altlernejoj/ Esperanto kiel studfako/ Akademiaj disertacioj/ Metodiko kaj didaktiko de altlerneja Esperanto-instruado/ Altlernejaj instruiloj por Esperanto/ Studentaj aktivecoj/ Evoluigo de intereso pri interlingvistiko kaj esperantologio en nacia skalo/ Internacia planado, prioritato kaj kunordigado de sciencaj esploroj pri Esperanto — ĉu ebla? La rolo de la Akademio, CED, de arkivoj kaj aliaj institucioj...

La kotizo por kompleta restado estas 250 markoj de GDR aŭ (por partoprenantoj el nesocialismaj landoj) 250 okcidentgermanaj markoj, pagebla surloke.

Alveturo: 27.04.90, busa veturo de Berlin al Bad Saarow; reveturo.: 02.05.1990.

Interesiĝantoj sin turnu al Esperanto-Asocio en Kulturligo, O.-Nuschke-Str.1, Berlin, DDR-1080 kaj petu aliĝilon kaj pluan informon.

KVINA CENTRA RENKONTIĜO de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, 25–27.05.1990

En la urbeto Brandenburg, situanta okcidente de Berlin en arbarplena kaj lagoriĉa regiono, GDREA okazigos sian Kvinan Centran Renkontiĝon (Landan Kongreson). Ĉiu esperantisto el ĉiu ajn lando estos bonvena. Entute ni atendas 200–300 partoprenontojn.

Dum la renkontiĝo ni diskutos novajn vojojn por la laboro de la esperantistoj de GDR, en konsidero de la ŝanĝiĝantaj kondiĉoj en nia lando, precipe pluan internaciigon.

Tranoktado: Turisma nivelo (komunaj dormejoj).

Prezo: ankoraŭ ne definitiva, ĉirkaŭ 120.00 markoj (por partoprenantoj el nesocialismaj landoj: ĉirkaŭ 100.00 DM aŭ kontraŭvaloro en transpagebla valuto). Lernantoj kaj studentoj ĝuos rabaton. Se vi ŝatus partopreni, skribu al la supra adreso.

Ekzamenoj ĝis kvar kontinentoj

Unu el la ĉefaj celoj reorganizi la internaciajn ekzamenojn de UEA kaj meti ilin sub la gvidon de ILEI estis porti ilin al la esperantistoj en siaj hejmlokoj, kaj ne plu devigi kandidatojn partopreni Universalan Kongreson, kio ĝis nun limigis la ekzamenojn al eŭropanoj kaj riĉaj aŭ bonŝancaj ekster-eŭropanoj. Ni klopodas demokratigi la aliron, kaj en la unua jaro de funkciado, la rezultoj montras kontentigan disvastigon. La nombro de kandidatoj restas modesta, sed ja du- ĝis triobligas la nombron de antaŭaj jaroj.

Sep sesioj organizitaj dum 1989 en ses lokoj portis la ekzamenojn en kvar kontinentojn, tiel ke en la laŭlanda resumo de sukcesintoj ne-eŭropaj landoj prenas altajn lokojn: Ĉinio 14, Usono 8, Francio 5, Nederlando, Svedio kaj Svislando po 3, Belgio, FR Germanio, Jugoslavio kaj Kanado po 2, Brazilo, Irlando, Italio, Norvegio kaj Ruando po 1.

La unuaj du sesioj okazis en Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds, Svislando, kiu ludis kuraĝigan kaj pioniran rolon en la relanĉo de la ekzamenoj per provizo de faciligoj, ne nur por la kursoj kaj ekzamenoj sed ankaŭ por la ellaboro de novaj testoj, kriterioj kaj ekzamen-metodoj. Niaj esperoj pri iama agnosko de la ekzamenoj flanke de oficiala eduka instanco ligiĝas ĝuste al KCE, kie ni antaŭvidas regule proponi la ekzamenojn. Tiu tradicio loki la ekzamenon en kulturaj aŭ universitataj centroj estas sekvinda, kaj trovas eĥon en la sukcesa sesio organizita sub la gvido de Audrey Childs-Mee en la Universitato de San-Francisko dum ĝia tradicia intensa somera kurso en Esperantologio.

La sesio en la Universala Kongreso restas utila kompreneble, kaj altiras tre internacian publikon; pozitiva sed etskala estis la unua klopodo porti la ekzamenojn al la junuloj en la IJK, kiu estas nepre ripetinda en estontaj jaroj, kvankam en Kubo tio povus ne sukcesi pro la samtempeco de la IJK kaj la Konferenco de ILEI.

La du lastaj sesioj de la jaro kronas niajn disvastigajn klopodojn; efektive la nombre plej sukcesa sesio de la jaro okazis dum la Tria Azia Konferenco de Instruado de Esperanto, per kiu ne nur 14 kandidatoj sukcesis, sed eble pli grave, tri ĉinaj ekzamenantoj estis enkondukitaj kaj akceptitaj. Tiu sesio, kaj la lasta en Ruando, povis okazi danke al vojaĝoj de s-ro Edward Symoens, la prezidanto de ILEI. Ni konstatu, ke preskaŭ ĉiuj el la sukcesintoj en tiuj sesioj estas personoj, kiuj ne povas eĉ esperi iam atingi ekzamensesion en Universa-

la Kongreso. Notinde, ke ILEI kaj ĉefe UEA finance subtenis la okazigon de la sesio en Ĉinio.

La rondo de rajtigitaj ekzamenantoj nun kreskis ĝis 18 en 12 landoj, kaj seso da pliaj proponoj estos traktitaj en la februara estrarkunsido, dum kiu kunsidos ankaŭ IEKanoj.

Kiu volas informiĝi detale pri la postuloj, celoj kaj enhavo de ĉi tiuj nur Esperant-lingvaj ekzamenoj aĉetu la *Gvidlibro al la internaciaj ekzamenoj* eldonita de UEA/ILEI en julio 1989 kaj jam unufoje represita. Ĉe UEA ĝi kostas 6,60 gld., ĉe FEL/ILEI, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio 120 BEF, ĉe KCE 5SFR, ĉe EAB 1,80 pundojn kaj ĉe HEA 50 forintojn.

Etaj modifoj okazas ankoraŭ en la enhavo, ĉefe kun la celo pligravigi la testadon de la kulturaj konoj, tiel, ke en la meza nivelo, ili estas ekde nun testataj ne nur parole sed ankaŭ skribe. Rimarkinde, en la unua sesio de 1990 en KCE, por la unua fojo la parola parto de la ekzameno estis publika (ne rajtis ĉeesti nur la ceteraj kandidatoj), kaj tio estas nepre ripetinda.

RESUMO DE LA REZULTOJ POR 1989

	Kontentige	Bone	Tre bone	SUME
Elemente	3	7	4	14
Meze	9	15	11	35
Sume	12	22	15	49
KCE januare	3	1	3	7
KCE aprile	1	2	1	4
San-F. julie	2	2	4	8
IJK julie	0	5	0	5
UK julie	2	6	1	9
Nanning nov.	4	5	6	15
Ruando dec.		1		1
Sume	12	21	15	49

Legante la liston de sukcesintoj, leviĝas la demando ĉu estis malsukcesintoj: jes, du/tri tra la jaro, sed ili estis eliminitaj per la gramatika/leksika antaŭtesto, ne per la ekzameno mem. Tio ne signifas, ke la ekzameno simpliĝis, male ĝi nun estas multe pli rigora ol antaŭ unu jaro kaj starigas la devon pruvi sian kapablon komuniki, t.e. uzi la lingvon aktive, en diversaj formoj: verki eseon, kompreni kaj lege kaj aŭskulte, kapabli paroli kaj pli grave *inter*paroli. Ekzemple, la devo pruvi aŭskultan komprenon estas tute nova al la ekzamenoj. El la sukcses-proporcio ni tiru du aliajn konkludojn: unue, prezentiĝas preskaŭ nur tiuj kandidatoj, kiuj jam atingis la nivelon, kaj due, la antaŭtesto, kiun oni emas bagateligi pro siaj mekanika karaktero kaj testado de gramatika kaj leksika kono kaj ne de komunika kapablo, tamen estas sufiĉe rigora por anticipe malkovri tiujn kelkajn, kiuj ne atingis la bezonatan nivelon.

Por 1990 estas fiksitaj sesioj en KCE en aprilo 16-21, en la kursoj de San-Francisko junie, dum estas proponoj pri sesioj en Grésillon en aprilo 10-21, en Kungälv, Svedio en junio 11-15, en Jugoslavio julie, kaj ideoj pri sesioj en Poprád, Slovakio kaj Koreio. Sekciestroj aŭ aliaj, kiuj interesiĝas pri okazigo de sesio en sia lando bonvolu anonci sin antaŭ majo al la sekretario de IEK, Stefan MacGill, Zsókavár ut. 46 IX 36, H-1157 Budapest, Hungario.

Resume, en 1989 ni vidis kvante modestan sed disvastige kontentigan relanĉon de la ekzamenoj. Ni ne rajtas supozi, ke tiu kresko aŭtomate multobligos sin, tion ni atingos nur per komuna strebado kaj konscio pri la graveco starigi normojn, defiojn kaj postulojn pri la altigo de la lingvo-scio kaj klereco de nia popolo.


smg

Kanto-kasedo

Dinnyés: AL VENKO!

16 esperant-lingvaj kantoj de la fama gitaristo-kantisto József Dinnyés (prononcu *Jo͡zef Dinjeŝ*). Krom liaj kantoj vi povas ĝui ankaŭ melodiligitajn verkojn de famaj Esperantaj aŭtoroj, kiel R. Schwartz, J. Baghy, L. Zamenhof kaj aliaj. Bonkvalita registra͡o, bela aspekto. Por aĉeti la kasedon, turnu vin al via Libroservo. Eldonis:LINGVO-Studio, Budapeŝto.

Esperanto por ni



Jen sistema kurslibro por junuloj inter la aĝoj de 8 kaj 12. Per abundaj bildoj ĉi tiu kvar-libra serio prezentas la bazon de Esperanto per nur Esperanto kaj donas multajn aktivigajn ekzercojn. Ne tiom por memlernantoj, sed tre utila materialo en la manoj de sperta instruisto. Verkis Jozefo kaj Helena Mikulás. Jam uzata kaj rekonata en oficialaj klasoj.

4 volumoj kun entute 264 paĝoj. Koloraj allogaj kovriloj. Ĉiu volumo kostas nur 45 forintojn de Hungara Esperanto-Asocio aŭ 9,90 guldenojn de UEA

DIFINA TEKSTO POR LA EKZAMENOJ ILEI/UEA

Ni emas tradicie pensi pri niaj ekzamenoj kiel internaj aferoj, por pruvi ene de la movado pri nia lingva kapablo. Sed ili povos esti samtempe valora ilo por atesti lingvan kapablon ankaŭ en la granda mondo, kaj por helpi en niaj klopodoj konvinki tiun mondon trakti Esperanton serioze kaj egalrange kun aliaj naciaj lingvoj.

Cele al tio ni devos iam akceptigi niajn ekzamenojn ĉe oficialaj, rekonataj edukaj instancoj, prefere je ŝtata aŭ interŝtata nivelo. Unue tamen, ni devas perfektigi ilin, por ke ili senmakule trapasu la rigoran ekzamenadon sub kiun ili falus antaŭ ol esti tiel akceptitaj. Tio bezonas longan tempon. Sed intertempe povos leviĝi kazoj kiam unuopaj ekzamenitoj havas bezonon pruvi al nemovadaj instancoj sian kapablon en Esperanto. Ja ekzistas eblecoj dungiĝi danke al Esperanto, kiu implicas la kapablon pruvi kompetentecon. Simple montri la esperant-lingvan atestilon verŝajne ne konvinkos ne-movadanon; necesas montri minimume nacilingvan dokmumenton, kiu klarigas la celon kaj valoron de la ekzameno.

Tial ni preparis koncizan tekston por traduko nacilingven, kaj ĝin ĵus aprobis la estraro de ILEI. Ni sekve povas ĝin prezenti en la denaskaj lingvoj de la estraranoj, kaj ni invitas aliajn liganojn traduki ĝin en siajn denaskajn lingvojn kaj sendi tion al ni. Post kompilo kaj kontrolo ni aperigos la tekston en multlingva dokumento, kiu elokvente atestos la multlingvecon de la mondo en kiu ni agadas. Ni krome povos liveri ĝin en la taŭga nacia lingvo al sukcesintoj kune kun la Esperant-lingva diplomo.

DISKONIGI LA EKZAMENOJN!

Esperante:

La Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI celas atesti unuavice komunikan kapablon en la Internacia Lingvo, Esperanto. Tio estas, konfirmi kapablon verki eseon, atesti kapablon kompreni nefakajn tekstojn, ĉu beletrajn, ĉu faktajn, kaj legatajn kaj aŭskultajn, pritaksi kapablon pri parolado kaj interparolado. Ne nur rego de la gramatika bazo de la lingvo estas subkomprenata, sed ankaŭ kapablo ĝin apliki en skriba, lega, parola kaj aŭskulta komunikado estas atendata. Krome, scioj pri la kulturo de Esperanto (ĝia historio, literaturo, organiziĝo kaj evoluo) estas testataj.

Ĉi tiu priskribo rilatas al la elementa kaj meza niveloj de la ekzamenoj, en kiuj la prijuĝo estas donita en kvar kategorioj: malkontentige, kontentige, bone kaj tre bone.

Angla:

The International Examinations of the Universal Esperanto Association (UEA) and the International League of Esperantist Teachers (ILEI) are designed in the first instance to attest communicative ability in the International Language Esperanto. That is, to confirm the ability to write a well-styled essay, to attest competence in understanding non-technical texts, whether literary or factual, in both written and spoken form and to evaluate performance in both making a spoken presentation and in holding a conversation. Not only a command of the grammatical basis of the language is required, but also facility in applying this to written, oral and aural communication. Knowledge of Esperanto culture (its history, literature, organisation and development) is also tested.

This statement applies to the Elementary and Intermediate levels of the Examinations, in which results are expressed in four categories: unsatisfactory, satisfactory, good and very good.

Nederlande:

De internationale Examens van de Wereldbond van Esperanto (UEA) en de Wereldbond van Esperanto-leerkrachten (ILEI) hebben als eerste doel te bevestigen dat iemand bekwaam is zich behoorlijk in de Internationale Taal Esperanto uit te drukken. Dit houdt in: een gewone tekst kunnen schrijven, niet-vakkundige gesproken of geschreven, letterkundige of algemene teksten begrijpen, een korte uitzetting houden en een gesprek voeren.

Niet alleen het teoretisch beheersen van de spraakkunst is vereist, maar ook de vaardigheid om deze vlot toe te passen bij het schrijven, lezen, spreken en beluisteren van de taal. Daarboven wordt een bepaalde kennis van de Esperanto-cultuur getest (geschiedenis van de taal, letterkundige werken, organisatie en ontwikkeling van de Esperanto-beweging).

Deze taalvaardigheidscontrole geldt zowel voor het elementaire als het voortgezette examen en wordt uitgedrukt in vier beoordelingen: onvoldoende – voldoende – goed – zeer goed.

Germane:

Die Internationalen Prüfungen (Grundstufe, Mittelstufe), die von der Welt-Esperanto-Organisation (UEA) und dem Internationalen Esperanto-Lehrerverband (ILEI) durchgeführt werden, konzentrieren sich auf die Anwendung der internationalen Sprache Esperanto im schriftlichen und mündlichen Bereich (fremdsprachige Niederschrift, verstehendes Lesen, verstehendes Hören, monologisches und dialogisches Sprechen).

Die Beherrschung der grundlegenden grammatischen Regeln sowie Kenntnisse zu den kulturellen Werten des Esperanto (Geschichte, Literatur, Sprachentwickelung, Fach- und Landesverbände der Esperantobewegung) werden in Zusammenhang mit der Lösung der genannten kommunikativen Aufgaben getestet und eingeschätzt. Bewertung der Gesamtleistung: ungenügend, befriedigend, gut, sehr gut.

Svede:

Världsesperantoförbundets (UEA) och Lärarnas Internationella Esperanto-förbunds (ILEI) internationella examina har som mål att i första hand intyga förmågan att kommunicera på det Internationella språket, Esperanto. Detta innebär:

- Bekräfta förmågan att skriva en uppsats.
- Bekräfta förmågan att förstå texter, dels skönlitterära och dels med faktainnehåll, dock ej av fackkaraktär, både lästa och avlyssnade.
- Bedöma den muntliga förmågan, dels att hålla ett anförande och dels att konversera.

Inte bara kunskap om språkets grammatikaliska uppbyggnad krävs utan även förmågan att tillämpa den i skriftlig, läst, talad och lyssnad form är nödvändig. Dessutom prövas kunskapen om Esperantos kultur (dess historia, litteratur, organisation och utveckling).

Denna beskrivning avser elementärnivån och mellannivån av examen, i vilka bedömningen göres i fyre betyg: icke godkänd – godkänd – väl godkänd och utmärkt.

Protokolo: internaciaj ekzamenojde UEA/ILEI, 1989

Elementa ekzameno (14 personoj el 5 landoj)

Lando, Urbo	Nomo	Sesio
Belgio, Namur	BURNAY, Robert	UK, julio
Ĉinio	LI, Li	Nanning, nov.
Ĉinio	DEXIONG, Qin	Nanning, nov.
Ĉinio	JIANMIN, Huang	Nanning, nov.
Ĉinio	JIANTONG, Chen	Nanning, nov.
Ĉinio	YULIN, Gu	Nanning, nov.
Ĉinio	ZHONGHAI, Pan	Nanning, nov.
Ĉinio	XUEGANG, Zhao	Nanning, nov.
Ĉinio	WEIZHUANG, Liu	Nanning, nov.
Francio, Bayers	COUTURIER, Dominique	UK, julio
Ruando, Kigali	NDALIHORANYE, Gaspard	Kigali, dec.
Svedio, Katrineholm	EMANUELSSON, Agneta	UK, julio
Svedio, Upplands-Vasby	HANSEN, Kaisa	UK, julio
Svedio, Gotene	SJOBERG, Inger	UK, julio

Meza ekzameno (35 personoj el 13 landoj)

Belgio, Embourg-C.	DUPONT, Denise	KCE, aprilo
Brazilo, Salvador.	SOARES, Cicero	UK, julio
Ĉinio	BING, Wei	Nanning, nov.
Ĉinio	JIANGUO, Liu	Nanning, nov.
Ĉinio	JIXIN, Lu	Nanning, nov.
Ĉinio	MIN, Chen	Nanning, nov.
Ĉinio	SHAOZHONG, Liu	Nanning, nov.
Ĉinio	TONGMIN, Zheng	Nanning, nov.
Francio, Dowaine	FAVRE, Alain	KCE, jan.
Francio, Besançon	POUX, Jacqueline	KCE, jan.
Francio, Fontainebleau	STACKLER, François	KCE, aprilo
Francio, Bourges	VURPILLOT, Fernando	KCE, jan.
Germanio FR, Weissenhorn	SCHERM, Michael	KCE, jan.
Germanio FR, Bayreuth	SVEJDA, Daniel	IJK, julio
Irlando, Dublin	DAVIES, Joy	UK, julio
Italio, Nudro	MASSIDDA, Maria-A.	UK, julio
Jugoslavio, Zagreb	PRANJIC, Ljiljana	IJK, julio
Jugoslavio, Đurdevac	SELES, Zdravko	IJK, julio
Kanado, Québec	BÉLISLE, Sylvain	San-F., julio
Kanado, Halifax	NORVELL, Stevens	San-F., julio
Nederlando, Nijmegen	GROOTEN, Nora	IJK, julio
Nederlando, Zaandam	RANSIJN, Piet	KCE, jan.
Nederlando, Sittard	DERKS, Wim	KCE, jan.
Norvegio, Tromsø	ROUGET, Claude	IJK, julio
Svislando, Emmenbrücke	BRUGGER, Franz	KCE, aprilo
Svislando, Les Brenets	GROSJEAN-R., Mireille	KCE, aprilo
Svislando, Lausanne	MARGOT, Nicole	KCE, jan.
Usono, Circleville	COOK, Lewis	San-F., julio
Usono, Rochester	DWELLEY, Robert	San-F., julio
Usono, Silver Spring	FLORES, Martha	San-F., julio
Usono, Pinole	HARLOW, Donald	San-F., julio
Usono, Hayward	ONET, Ionel	San-F., julio
Usono, Rigby	ROFF, Derek	San-F., julio
Usono, New York	VICTOR, Arnold	UK, julio
Usono, Goldendale	WHEELER, Doris	Nanning, nov.

LETERKESTO

Kvankam revuo pri pedagogio, IPR mem ŝajne ne multe profitis el la pedagogia arto, ĉar nek lingve, nek aritmetike ĝi daŭre brilas: la (unua) **18**a jarkolekto (tiu de 1988) estis duone kvarmonata kaj duone trimonata (ĝi do devus konsisti el 3.5 numeroj); la (dua) **18**a jarkolekto (tiu de 1989) jam estis komplete trimonata, do kvarnumera. Ĉu nun sekvos (tria) **18**a, 19a aŭ 20a jarkolekto?(...) Sub la rubriko **Gramatiko**, post la misa artikolo pri la sufikso –iĝ– (2/89, 15) de F. G. Blázquez, jen nordulo kiu volas trudi sian fuŝkomprenon pri –ita (4/89, 29). Tiu teksto estas absolute absurda. (Bedaŭrinde ne estas en ĝi pli da "oo" ol kvin, ĉar alie oni tuj vidus ke temas pri reformprovo.) Nu, komentojn mi ne donos. Mi nur demandas: Kiel estas eble esprimi (havi) tian opinion? Kaj kiel estas eble akcepti ĝin en la revuon? Ĉu tiajn tekstojn redaktoro ne povas laŭ(mal)valore prijuĝi kaj rifuzi? (Mi agnoskas: reagoj povas esti interesaj, vidu tiun tre taŭgan de A. A. Núnez; sed, se ni konsideras tian reagon, kiel la bonveniga de brazilano, ni komprenas ke erarigaj ensendaĵoj estas danĝere subfosaj.)(...) Fine, ni rigardu la "tipografiajn" erarojn:

3/89, p.16: evoluitan: evoluinta sistemo;

3/89, p.18: kiuj spicis sian: lian analizon; prezentis lumbildojn pri Kimrujo, kiu...: **kio** estis bela kompletigo...

4/89, krom multaj preseraroj, jenaj tamen ne estas akcepteblaj:

p. 2 (supre): la okazon renkonti eksterlandanoj (?);

p. 4 (malsupre): mi situis la fenomenon: situ**igis**;

p. 6: li notis jena mallonga poemeto (3 akuzativoj!);

(malsupre): sen antaŭ, duma aŭ poste klarigo: antaŭ**a**, duma, posta;

p. 13: klarigante la problemoj (?);

p. 17: ke ili integriĝ u...la instruadon: **integru**;

p. 25: Mi tre ŝatas la pensemulojn, tiujn, kiujn...(**kiuj**).

Christian Declerck, Antverpeno, Belgio


La redaktoro pardonpetas pro la fuŝoj kaj misoj tute prave listigitaj ĉi-supre, kiujn kaŭzis jen malzorgemo, jen ne sufiĉe atenta re-tralego, jen obstine oo-ema klavaro... Ni tamen ne povas konsenti kun la demandoj: "Kiel eblas esprimi (havi) tian opinion? Kiel estas eble akcepti ilin por publikigo?"

Laŭ nia kompreno, ĉiu rajtas havi ian ajn opinion, kaj eblas, ke ni akceptu ĝin – eĉ se ni mem ne konsentas – ĝuste en la espero ekkoni aliajn vidpunktojn – kaj efektive, reagoj ne mankis. Eĉ, ni devas gardi nin ne fariĝi gramatika revuo... Tial, post la ĉi-sekva letero ni konsideros, kun Via bonvola kompreno, la

-iĝ-debaton finita. (Pro la sama kaŭzo ni forlasis certajn partojn de la letero de s-ano Declerck, por ne revigligi ĉi-organe la ata-ita-diskuton; aliaj neaperigitaj alineoj estis, laŭ nia gusto, tro akre mokaj pri certaj niaj kunlaborantoj; aŭ male, tro laŭdaj por ni mem.) — La red.

Pri la artikolo de Blázquez kun miro mi legis la laŭdan leteron de s-ino Krieger, el Brazilo, ĉar ankaŭ mi trovas tiun artikolon *tute ne klara*, eĉ konfuza por la E-gelernantoj. La temo estas tute fuŝe pritraktita kaj respondas nek al la Fundamento, nek al la nuna uzo. Estus interese scii, kion opinias la Akademio pri tiu artikolo.

Jeannine Vincent, Baugé, Francio



DONACOJ AL FONDAĴO SZERDAHELYI

La nova fondaĵo anoncita en la antaŭa IPR jam altiris la unuajn donacojn. Al ĉiuj donacintoj ni tre kore dankas:

Lawrence Mee, Britio	51,60
Germain Pirlot, Belgio	172,41
Elfriede Ernst, Belgio	1000,00
Willem Verloren van Themaat, Nederlando	32,36
Elna Matland, Norvegio	100,00
SUME:	1356,37 svedaj kronoj

RECENZO:

KREITO: Lernu kreive!

Ilona Sirkó, Hungario

Ne okazas ofte, ke ekstermovada firmao produktas rimedon por helpi la instruadon de Eo. Tamen tion faris en Hungario la presejo Pannon Nyomda en urbo Veszprém: ĝi produktis proprariske instruhelpilon.

La lingva ludilo troviĝas en libroforma skatolo, bele kaj firme kovrita, samformata kaj preskaŭ samdika kiel la Plena Ilustrita Vortaro. Ĝi enhavas kartetojn kun la dimensioj de 6 X 3.5 cm, sur kiuj estas presitaj aparte ĉiuj afiksoj, prepozicioj kaj 200 + 400 vortoj. En la skatolo troveblas ankaŭ broŝureto, kiu kvinlingve (E-e, hungare, germane, hispane kaj angle) informas pri la uzado de la lingvoludilo por komencantoj. Por progresantoj nur E-e legeblas la informoj pri maniero de taksado kaj ses diversaj proponitaj ludmanieroj. Aparta ĉapitro priskribas la 16 regulojn kiel bazon de gramatiko, kaj fine troveblas listo de 200 plus 400 vortoj, kies signifon la uzantoj povas enskribi en sia propra lingvo.

Uzante la 770 vortkartetojn kaj afiŝokartojn oni povas lerni la vortojn kaj pliperfektigi la lingvoscion. Ekzemple oni tiras 54 vortojn, per kiuj — uzante la afiksojn kaj prepoziciojn — eblas fari plurajn frazojn. Sed ne gravas, ĉu la frazo havas sencon aŭ ne, gravas nur, ke gramatike ĝi estu perfekta. Tio helpas perfektigon de la lingvouzo, samtempe la strangaj frazoj ĉiam amuzas la kunludantojn.

Per unu kompleta lingvoludilo povas ludi 4-5 gelernantoj. Uzante plurajn ludilojn ankaŭ en lernejaj klasoj eblas instrui per ĝi.

La valoron de la alloga lingvoludilo iom malaltigas tiuj kelkaj lingvaj kaj preseraroj, kiuj troveblas en la informbroŝureto. Feliĉe ili aperas nek en la gramatika tabelo nek sur la kartetoj — tiel la gelernantoj renkontas senriproĉan lingvaĵon.

Kreito estas akirebla kontraŭ 28.50 guldenoj ĉe la Libroservo de UEA.

Jarkolekto 20 **jan.-mar. 1989** **N-ro 1, 1990**

«Internacia Pedagogia Revuo» estas sendependa forumo de la tutmonda pedagogaro. Ĝi aperas kvarfoje jare. La redakcio rajtigas sin mallongigi aŭ korekti la manuskriptojn nur laŭ lingvaj vidpunktoj. Manuskriptojn ni ne resendas. Reproduktaĵoj, tradukaĵoj estas permesataj, eĉ rekomendataj, kune kun fontindiko.

Monato

multaj kialoj por legi ĝin ĝuste **nun**!



Mendu provekzempleron ĉe Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

HONORAJ MEMBROJ

Peter Zlatnar (YU, 1984) – Mario Dazzini (I, 1985) – Erbetta Marcel (CH, 1986)
Irja Klemola (SF, 1986) – Olle Olsson (S, 1986) – Jozef Toczyński (PL, 1986)
Helmut Sonnabend (D, 1987) – Catina Dazzini (I, 1988) – Szerdahelyi István (H, 1988)
M.H. Saheb-Zamani (IR, 1989)

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Argentino : Herminia Kirkerup de Fernandez (s-ino), Calle Cerrito 1.249, Barrio San Martín, RA-5000 Córdoba, (Córdoba)
Aŭstrio : Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
Belgio : Marc Demonty, Schoolstraat 3, B-1710 Dilbeek
Brazilo : Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 São Paulo SP
Britio : Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 82D
Ĉeĥio : Vêra Barandovska, Volgogradská 41, CS-70400 Ostrava 3
Ĉinio : Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normal University, 430070 Wuhan, PR China
Estonio : Palu Johannes, Solme 21, SU-200016 Tallinn, Estonio
Finnlando : Synnöve Mynttinen, Pursimiehenkatu 12 B 46, SF-00150 Helsinki
Francio : Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim
F.R. Germanio : Stefanie Tucker, Alatseestr. 14, D-8900 Augsburg
Germana D.R. : Till-Dietrich Dahlenburg, Str. der DSF 13, DDR-2722 Brüel
Hispanio : Manuel López Hernández, Poŝtkesto 832, E-41080 Sevilla
Hungario: : Márta Kovács, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest
Israelo : Murĵan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
Italio : Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa
Japanio : Toi Kunio, 1448-1 Simotakajyanagi, Kazo-si, Saitama 347
Jugoslavio : Sonja Tavčar, Liminijanska 6, YU-66320 Porotorož
Korea Resp. : Gilsu So, Sodaemun, P.K. 59, Seoul-120
Nederlando : D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe
Nordameriko : Ian Richmond, 66 Naomee Cres., London, Ont. Canada N6H 3TS
Norvegio : Åge Melå, Beverstien 2, N-3190 Horten
Pollando : Tadeusz Ejsmont, ul. B. Bartoka 1 m 49, PL-92 547 Lódź
Portugalio : Alexandre Kasesa, Rua Actriz Palmira Bastos 10, 4'B, P-1900 Lisboa
Sanmarino : Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, I-43031 San Marino
Slovakio : Anton Zachariáš, Sobotské námestie 6, CS-05801 Poprad
Sud-Afriko : Japie Spoelstra, Posbus 20185, Noordbrug 2522, Suid-Afrika
Svedio : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby
Svislando : Edgar Jobin, F.W. Dubois 11, CH-2400 Le Locle
Venezuelo : Inĝ. Felix Garcia Blasquez, Apartado 75.090, YV-1070 A Caracas
Zairio : Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre)

REPREZENTANTOJ

Bangladeŝo : Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000

Centrafrika Resp. : Luc Feidangai, B.P.960, Bangui

Ĉilio : Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago

Hindio : Abani Halter, Jamboni, P.O.Bolpur 731204, W. Bengal

Irano : Mohammad Karamudini, P.O.Box 13445-747, Tehran/Iran

Niĝerio : Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Ekpoma Bendel

Tanzanio : Mramba Simba, S.L.P. 1051, Bunda Mara

LABORKOMISIONOJ

Statistiko : Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, B-8400 Oostende
Tel. (059) 70.87.00

Didaktikaj lud(il)oj : Georges Sossois, rue du Basson 79, B-6001 Marcinelle
Tel. (071) 43.62.05

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO : (Rilatoj de reciproka informado, Kategorio C)
: 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris.
Reprezentantoj de ILEI:
James Fairbank, 6 Avenue Th. Rousseau, F-75016 Paris
François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, F-75010 Paris

UEA : Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

IEI : Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag

KCE : Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

Kontribuajoj al IPR

tajpitaj kun duobla interspaco kaj marĝenoj, al la adreso de la Redaktejo (vd. kovrilpaĝon)

Abonado al IPR kaj membriĝo al ILEI:

(membrokotizo 40 Svedaj Kronoj)

1) poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). «La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj» (ILEI). Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby (Svedio).
2) poŝtĝirkonto: 3789 64 — ILEK-A — de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando), por la interna konto ILEK-A de ILEI.